

pola esperantisto

socikultura revuo de
polaj esperantistoj

Fondita en 1906 • N-ro 4/2004 • ISSN 0032-2431

„pola esperantisto”

„pola esperantisto” presis
intervjuon kun mi faritan
de Stanisław Mandrak fermitan
tiel ke mi ion forgesis

ekzemple pri la opinio
ke tiu ĉi revuo bona
estas modesta sed impona
per la impresa harmonio

oni sentas ke redaktoro
scipovas elekti gravaĵojn
kaj elimini banalaĵojn

travivas la movado triston?
jes aŭ ne — fariĝu sponsoro
legu „polan esperantiston”

Zuriko, la 25an de aŭgusto 2004 JSS
www.skorupski.com

4
2004

Enhavtabelo:

3 REDAKTORE – Kazimierz Leja

HOMOJ EKSTERORDINARAJ

4 Andrzej Warszawski: *La plej fama virino de sia generacio.*

LINGVA ANGULETO

8 Czesław Baranowski: *Praktika uzado de la prepozicioj ĈE kaj APUD.*

FELIETONE

10 Christian Pinard: *Kia Eŭropo, kia movado bezonas Esperanton?*

MOVADE

12-31 *Diversaj primovadaj informoj, raportoj, novaĵoj.*

LITERATURE

32 Barbara: *La feria amo.*

36 Czesław Miłosz: *Meditado (trad. Lidia Ligęza)*

Kovrilpaĝe: La plej freŝa soneto de J.S.Skorupski.

pola
esperantisto

Socikultura revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare. Eldonas: Eldonejo HEJME • <http://www.hejme.e-tools.pl> • Redaktoro: Kazimierz LEJA.

Ĉiujn korespondaĵojn kaj kontribuojn sendu nur al la redaktoro:

**PL 41-250 Czeladź, skrytka 59; retpoŝto: esperanto@hejme.e-tools.pl.
tel: (+48 32) 265 00 38**

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al:

BRE Bank SA-mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644.

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:

UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto: <leja-t>

N-ro 4/2004 • ISSN 0032-2431 • Eldonkvanto (nakład): 250 ekz.

Kazimierz Leja

Karaj legantoj,
rapide pasas la tempo de vojaĝoj,
kongresoj, renkontiĝoj... Revenas la
tempo de streĉa laboro, tempo matura
por pripensi agad-aferojn, analizi
staton kaj kvaliton de nia kluba vivo,
nia aktiveco. Kelkaj el vi sendis jam rap-
portojn, leterojn por kiuj mi tre dan-
kas. Ne por ĉiuj troviĝis loko en la ku-
ranta numero, ankaŭ por multnombre
senditaj fotoj. Se eblos, ili trovos lokon
en la sekvantaj eldonoj de *PE*.

Ĉi-numero komenciĝas per artikolo
pri fama pola (2-foja) Nobel-premi-
itino, Maria Skłodowska-Curie, plu-
me de Andrzej Warszawski. Tuj post la
konstanta lingva rubriko de Czesław
Baranowski, la pensiga (mi esperas)
felietono de Christian Pinard, kiu pro-
vas trovi respondon al gravaj por ĉiuj
esperantistoj demando...

Krom sekvantaj raportoj de niaj le-
gantoj vi trovos unu literaturan pro-
von de nia preskaŭ-anonima kole-
gino, kaj tradukon de la versaĵo de
jus forpasinta fama Nobel-premiito,
Czesław Miłosz, fare de Lidia Ligęza.
Kaj la bela, neatendita surprizo sur la
kovrilpaĝo...

Kiel promesite, oktobre ni reve-
nas al prihistoriaj artikoloj de Zo-
fia Banet-Fornalowa kaj aliaj aŭtoroj,
kies promesitan kunlaboron mi inten-

cas perforte efektiviĝi (vidu sube).

*En la antaŭa numero mi proponis
por ĉiu funkcianta E-klubo, organizo,
asocio en Pollando, konstantan lokon
en PE, redaktatan memstare de ili, sen
korektoj kaj „cenzuro”. La intenco estis
(kaj estas) jena: respeguligi la faktan
aktivecon de ĉiuj en unu loko kaj doni
impreson pri ŝajna kunlaboro de ĉiuj.
NENIU reagis.*

Mi bone memoras, kiom ofte ekz.
junularo petis pri propra loko en la
„oficiala organo” pasinte, kaj trovadis
ĝin preskaŭ neniam. *PE* estas nek „ofi-
ciala” nek „organo” (kvankam la Jarli-
bro de UEA informas kontraŭe). Ta-
men povas fariĝi tia, se nur ekestos por
tio kondiĉoj kaj volo de la plimulto.

Se vi volas, ke *PE* fariĝu ankaŭ pli
okulfrapa (kun ekz. kolora kovrilo, pli
varia grafike, ktp.), **kontraŭ la sama
prezo**, necesas kolekti minimume 350
konstantajn abonantojn. Post preskaŭ
2-jara ekzisto *PE* havas 200 abonan-
tojn (kompare kun 160 en la 2003 j.).
Neniu sponsoras la revuon, krom 2-3
personoj neniu alia serĉas novajn abo-
nantojn, UEA silentas pri ĝia ekzisto.
Al ĉiuj mi dediĉas la kovrilpaĝan so-
neton de JSS — ĉio estas en niaj (miaj
kaj viaj) manoj, karaj legantoj.

Ni iru antaŭen...

via redaktoro

HOMOJ EKSTERORDINARAJ

Andrzej Warszawski

La plej fama virino de sia generacio

Novembre 1891 el Varsovio veturis Parizon unu dudekkvarjarulino. Denaska varsovianino sukcese finis 1883 porknabinan gimnazion gajninte oran medalon. Poste per memlernado ŝi provis prepari sin por realigi revon de sia vivo — studu ĉe la universitato. Ne havante eblecon fari tion en sia patrolando, tiutempe dispartigita de najbaraj ŝtatoj, ŝi devis vojaĝi eksterlanden. Tutcerte ĝi estis decida vojaĝo de ŝia vivo. Post jaroj, en 1905 kaj 1911, preskaŭ same gravaj estis ŝiaj vojaĝoj al Stokholmo por ĉeesti la solenaĵon de enmanigo de la Nobelpremio. La duobla Nobelpremiitino, *eble la plej fama virino de sia generacio*, forpasis antaŭ sesdek jaroj, la 4an de julio 1934 en Sancellemoz pro anemio. *La naturo venĝis je tiu, kiu forŝiris ĝiajn misterojn*¹. Kaj en pola faka revuo oni konstatis, ke *la morto kaŝis nedaŭran formon fizikan en ombro de kaŝtanoj en Sceaux, sed senmorta povo de la granda Individuulino daŭre vivos en mensoj kaj koroj de generacioj*².

Ŝajne ĉiuj legantoj jam divenis, ke temas pri Maria Skłodowska-Curie. Ĝuste ŝi veturis tra preskaŭ tuta Eŭropo por studi matematikon kaj fizikon ĉe la Sorbono. Post jaroj en sia *Membioĝrafio* ŝi konfesis: *Havante nenian alian okupon mi tute mergiĝis en lernadon, kaj la ekkono de novaj objektoj faris al mi grandan ĝojon. Kaj dum la tuta tempo miaj vivkondiĉoj estis ja malproksimaj al bonstato, ĉar miaj propraj fondusoj estis tre malabundaj kaj la familio ne havis rimedojn por helpi al mi malgraŭ siaj plej bonaj intencoj. Cetere mia situacio ne estis unika; la samon oni povis diri pri multaj aliaj polaj studentoj*³. La lasta jardeko de la XIX jarcento estis eksterordinara periodo en scienco. En 1895 germano Wilhelm Konrad Roentgen malkovris novan specon de radiado: la X-radioj. En 1896 franco Antoine Henri Becquerel rimarkis, ke simile misterajn radiojn emi-

¹ Ambaŭ citaĵoj: Czesław Białobrzski, *Życie i działalność Marii Skłodowskiej-Curie*, Towarzystwo Naukowe Warszawskie, Warszawa 1935. Ĉiujn citaĵojn en la artikolo tradukis A. Warszawski.

² Przemysł Chemiczny, 18 (1934) 140.

³ M. Skłodowska-Curie, *Autobiografia*, Państwowe Wydawnictwo Naukowe, Warszawa 1959.

sias saloj de uranio. Ĝuste la lasta malkovro vekis intereson de Maria Skłodowska, kiu fininte studadon serĉis temon por doktora disertaĵo. Ŝi komencis eksperimentojn, kies rezultatoj allogis al kunlaboro fizikiston Pierre Curie, al kiu Maria edziniĝis en 1895.

En 1898 por priskribi la esploratan fenomenon Maria proponis novan, hodiaŭ ĝenerale konatan, terminon: radioaktiveco. Samjare geedzoj Curie dufoje (julie kaj decembre) anoncis malkovron de novaj kemiaj elementoj nomitaj de ili polonio kaj radiumo. Nun Maria komencis izoli radiumon el peĉa blendo, kiu estis defalaĵoj de la enhavantaj uranion ercoj el minejoj lokigitaj en la ĉeĥa urbeto Jáchymov. En ŝia *Membioĝrafio* legeblas: *Finfine venis la momento, kiam la izolita substanco montris ĉiujn proprecojn de pura kemia korpo. La substanco, radiumo, havas specifan spektron. Mi povis ankaŭ determini ĝian atoman mason, ege pli grandan ol atoma maso de bario. Mi realigis tion en la 1902 jaro. Tiam mi havis unu decigramon da tre pura radiuma klorido. Mi bezonis kvar jarojn por pruvi, konforme al postuloj de kemio, ke radiumo fakte estas nova elemento.*

Post ok jaroj, en 1910, kunlaborante kun André Debierne ŝi sukcesis ricevi metalan radiumon. Tiuj ĉi atingoj permesis al Maria ne nur doktoriĝi defendante 1903 la disertaĵon titolitan *Esploroj de radioaktivaj substancoj*, sed kaŭzis dufojan atribucion al ŝi de la Nobel-premio: 1903 surkampe de fiziko (kune kun A. H. Becquerel kaj P. Curie) kaj 1911 surkampe de kemio. Ĝis nun neniu estis distingita dufoje per ĉi tiu premio pro sciencaj atingoj⁴. Tion oni mencias eĉ en beletrio: *Memoru, ke Maria Skłodowska–Curie ricevis ĝin (la Nobel–premion A.W.) dufoje, kaj tio okazis en la tempo, kiam oni almenaŭ permesadis al virinoj ricevi ĝin unufoje* — diras profesoro al sia talentriĉa studentino en la fama romano *Premioj*⁵.

Post akcidenta forpaso de sia edzo en 1906 Maria Curie daŭrigis sciencajn laborojn. Ŝi fariĝis estrino de la katedro pri fiziko. Kiel la unua virino, lekciis fizikon ĉe la Sorbono–universitato. En 1908 Maria Skłodowska–Curie estis nomumita ordinara profesoro. Post jaroj unu el ŝiaj lernantinoj rememoris jene: *Maria Skłodowska–Curie lastfoje lekciis en la Sorbono printempe de la 1933 jaro. Tiam mi havis honoron asisti ŝin pretigante mian diplomon laboraĵon. (...) Tiam en la Sorbono Madame Curie lekciadis kune kun Jean Perrin. Nenia kontrasto okulfrapis plie, kiel tiu ĉi ekzistanta inter la paro: Jean Perrin kondukanta kiel profeto, korecepta, Madame Curie pli severa kaj ŝajne pli seka. La unua ekzaltis per lirikeco*

⁴ Dufoje oni atribuis la Nobel–premion al Linus Carl Pauling (1901–1994), sed nur unu estis pro sciencaj atingoj en kemio (1954). La dua premio (1962) estis atribuita pro pagado.

⁵ Erich Segal, *Prizes* (Premioj), pola eldono Świat Książki Warszawa 1996.

de la scio, la dua — per ĉiopovo de la sciencaj esploroj. (...) Starante antaŭ tabuloj, sur kiuj estis videblaj radioaktivaj familioj, Madame Curie faris 1,5- kaj iufoje eĉ duhoran lecion diskretan, kompaktan, malfacilan. Dum praktika ekzercado, kiun gvidis Irena Joliot, Madame Curie ofte venadis kaj priparoladis kun studentoj malfacilaĵojn, kiujn en ankoraŭ mallertaj manoj kaŭzis la fadenaj elektrometroj laŭ la konstruo de Wult⁶.

Apartan signifon havis agado de Maria Skłodowska-Curie dum la unua mondmilito, en la tempo de la *grandamasa reciproka buĉado*, kiu tiel forte malhonoras la civilizitan mondon⁷. Tiam ŝi, universitata profesorino, sukcesis eluzi sciencajn atingojn por savi vivon de la batalantaj armeanoj. Ŝi ekipis aŭton per radiologia aparato kaj komencis vizitadi per la *voiture radiologique* (radiologia aŭto) ĉeffrontajn malsanulejojn por helpi al kirurgoj operacii vundojn. Tiam la radiologia scio ne estis ankoraŭ vaste konata inter kuracistoj. Pluraj el ili estis mirigitaj, ke helpe de la X-radioj oni povas vidi ostojn aŭ obuserojn. Maria Skłodowska-Curie komence sukcesis konvinki dubantajn kuracistojn pri neceso apliki la X-radiojn por diagnozado kaj poste organizis novajn radiologiajn aŭtojn. Ŝi gvidis kursojn por virinoj, por ke ili priservu radiologiajn aparatojn. En tiu ĉi laboro helpis al Maria ŝia filino Irena. Kaj rezulte de ĉi tiuj penoj tra ĉeffrontaj teritorioj portis helpon al vunditoj pluraj radiologiaj aŭtoj, nomataj de soldatoj karese *les petites Curie* (etaj Curie). Siajn militajn spertojn Maria resumis en la libro *La radiologie et la guerre* (Radiologio kaj milito). Pri la milito Maria Skłodowska-Curie notis: *Neniam mi forgesos teruran impreson, kiun mi sentis vidante tian masakron de homaj vivo kaj sano. Por ekmalamegi nur apartan ideon de milito sufiĉas unufoje vidi tion, kion ni vidadis tiomfoje dum tiuj ĉi jaroj — la virojn kaj junulojn alportitajn en miksaĵo de koto kaj sango al ĉeffrontaj ambulancoj. Oni kondamnis multajn el ili al rapida morto, plurajn aliajn — al monatoj plenaj de doloro kaj sufero. Tiam neniu povis imagi al si militon pli teruran. Partoprenis ĝin 33 ŝtatoj, kiuj mobilizis entute 70 milionojn da soldatoj. Dum la unua mondmilito ĉirkaŭ 10 milionoj da homoj perdis sian vivon, krome 20 milionoj estis vunditaj kaj ĉirkaŭ 10 milionoj mortis rezulte de malsato kaj epidemioj.*

Netrotaksebla estas ankaŭ organiza agado de Maria Skłodowska-Curie. 1912 ŝi iniciatis konstruadon de la Radium-Instituto en Parizo. Ĝi ekfloris nur post la unua mondmilito allogante junajn adeptojn de scienco el la tuta mondo. En la in-

⁶ Maria Antonina Tonnelat, *Experimentum crucis*, (en:) *Studia poświęcone Marii Skłodowskiej-Curie i Marianowi Smoluchowskiemu* (red. A. Teske), Zakład Narodowy im. Ossolińskich Wydawnictwo Polskiej Akademii Nauk Wrocław Warszawa Kraków 1968.

⁷ L. L. Zamenhof, *Post La Granda Milito. Alvoko al la diplomatoj*, 1915.

ternacia atmosfero oni pretigis 1919–1934 en la Radium–Instituto 483 sciencajn publikajojn. Inter ili estis 31, kies kunaŭtorino estis Maria Skłodowska–Curie. Krome ŝi apogis disvolvon de esploraj centroj en sia patrujo. En Varsovio oni fondis komence la *Kernbaum* Radiologian Laborejon kaj en 1932 estis malfermita la Radium–Instituto. La solenaĵon ĉeestis Maria Skłodowska–Curie mem. Ŝi donacis al la instituto unu gramon da radiumo.

Mi ne intencas pli detale priskribi ŝian vivon kaj agadon, ĉar la leganto interesiganta pri Maria Skłodowska–Curie facile trovos multajn konvenajn biografiojn, ŝajne en ĉiuj lingvoj. Mi mencios du verkojn plume de la Curie–familianoj: *Membiografion* kaj biografion verkitan de filino Eva. Tre valoraj kaj samtempe nekutimaj estas biografioj de Françoise Giroud (*Une femme honorable*, pole eldonita sub la titolo *Maria Skłodowska–Curie*, PIW, Warszawa 1987) kaj de Susan Quin (*Marie Curie. A Life*, pole eldonita sub la titolo *Życie Marii Curie*, Prószyński i S–ka, Warszawa 1997). La silueto de Maria Skłodowska–Curie fascinis homojn en la tuta mondo tiagrade, ke *eĉ en Ĉinio, kien ŝi neniam vojaĝis, ŝia portreto troviĝis en la konfucea templo kune kun la portretoj de Budho kaj ĉielaj imperiestroj*⁸.

Aŭtune 1891 el Varsovio veturis Parizon unu dudekkvarjarulino. Por studi. Post pli ol unu jarcento oni propagandis alloge, ke aliĝinte Eŭropan Union polaj gejunuloj havos eblecojn edukiĝi eksterlande. Oni forgesis tamen, ke ne povante studi en patruja ŝtato pola junularo sukcese faris tion en la tuta Eŭropo. Maria Skłodowska–Curie, denaska varsovianino kaj honora civitanino de la urbo, ŝajne estas la plej bona kaj tutmonde konata ekzemplo. Nenio nova sub suno...

⁸ Eleonory Doorly, *The radium woman*, Penguin Books Harmondsworth, Middlesex 1953.



Czesław Baranowski

Praktika uzado de la prepozicioj ĈE kaj APUD

Ambaŭ prepozicioj estas ofte uzataj de esperantistoj, sed en praktika uzado ili iome diferencas inter si. **La diferenco estas jena:** la prepozicio **ĉe** montras tuŝan proksimecon kaj la prepozicio **apud** montras netuŝan proksimecon. Tiun ĉi diferencon oni povas facile rimarki legante la suban frazon:

*Mi ne loĝas ĉe miaj gepatroj, sed mi loĝas aparte kaj mia loĝejo estas **apud** ilia loĝejo (estas flanke de ĝi).*

La prepozicio **ĉe** esprimas do la ĝeneralan ideon de senpera tuĉeco kaj pli precize montras:

1) tuŝan proksimecon en la spaco:

Ekz.: Pordisto staras **ĉe** la pordo. La tuta familio sidas **ĉe** la tablo. Vroclavo situas **ĉe** la rivero Odero. Mi atendas vin **ĉe** la limo de mia urbeto. Vizitante Koszalin ni haltis **ĉe** la malsupro de Chełmska-monto.

En Mielno, tute **ĉe** la rando de pinbarbaro, etendiĝas sabloza strando. Somere **ĉe** la pola marbordo ripozas multaj eksterlandaj turistoj. **Ĉe** kiu strato vi loĝas? Mi loĝas **ĉe** (en) la strato Verda. Mi fiksas Esperantan flage-ton **ĉe** mia fenestro. Esperantistoj metis florojn **ĉe** la memorŝtono omaĝe al D-ro L. L. Zamenhof.

2) tuŝan proksimecon en la kampo de la homa aktiveco:

Ekz.: Baldaŭ ploro anstataŭis **ĉe** ŝi la gajecon. Infanoj ne povas longe teni **ĉe** si sekreton. La knabo lernis metion **ĉe** botisto. La instruistino de Esperanto estis en favoro **ĉe** sia direktoro. Mia amikino servas **ĉe** la komerca konsilanto kaj ŝia edzo laboras kiel profesoro **ĉe** Varsovia Universitato. En la varmaj landoj la suno radias alian varmegon, ol **ĉe** ni. La ideo krei la internacian lingvon aperis **ĉe** Ludoviko Zamenhof tre frue. Malkorekta uzado de difina, senfleksia artikolo **la** estas tre ofte renkontata **ĉe** komencantoj. Mi ĝojas **ĉe** la penso, ke venontjare ni devone renkontiĝos en Mielno.

3) koincidon aŭ ligitcon inter ago kaj okaza cirkonstanco:

Ekz.: Vilaĝanoj ofte vekigaŝ **ĉe** la koka krio. Ili neniam enŝaltas lumon **ĉe** la komenco de vesperiĝo. Agrable estas observi la maron **ĉe** la subiro de l' suno. Multaj homoj ekscitiĝas **ĉe** la plej malgranda bagatelo. Mi ofte laboras **ĉe** arta lumo kaj dormas **ĉe** malfermita fenestro. **Ĉe** utiligado de Esperanto en Eŭropa Unio oni povus ŝpari multe da mono. Orsola belege akor-

dionas kaj ĉe tio plaĉe kantas. Jacek Kuroń lasis estiman memoron ĉe ĉiuj, kiuj konis lin pli proksime.

La prepozicion ĈE ni uzas ofte en aliaj esprimoj pli malpli metaforaj.

Ekz.: Sidante ĉe la glaso da biero ni babilis pri diversaj aferoj. La popolo devas firme stari ĉe siaj postuloj. Preleganto longe tenis sin ĉe sia vorto. La maljunaj geedzoj sidis ĉe sia vespermanĝo. Eĉ ĉe la plej bona volo ili ne alkutimiĝis al vegetara dieto. Li ofte sentas pikadon ĉe la koro.

La prepozicio ĈE estas uzata ankaŭ en la funkcio de prefikso:

Ekz.: Mi ĉeestis la 5an Pomerian Esperanto–Renkonton. Al ĉeestantaro ege plaĉis tiu ĉi aranĝo. Ĉu vi havas ion ĉemane (tute pretan sub la mano)? Ĉemara pejzaĝo allogas turistojn dum la tuta jaro. Ĉebalta Esperantista Printempo estas vaste konata en Esperantujo.

La prepozicio apud, esprimanta netuŝan proksimecon, signifas en praktiko la personon aŭ objekton plej proksiman, troviĝantan *flanke de* aŭ *ĉe la flanko de* **iu** aŭ **io**.

Li sidas **apud** la tablo kaj legas gazeton (la tablo troviĝas flanke de li).

La filino staras **apud** la patro. La fenestro troviĝas **apud** la pordo. Mesoservantoj staris **apud** la altaro (dekstre aŭ maldekstre de ĝi). Aperis interesa artikolo pri historia batalo **apud** Grunwald. La fotelo staras nun tute **apud** mia klaplito. Ŝi naskiĝis en mal-

granda vilaĝo **apud** Varsovio.

Rimarko: La prepozicio **apud** estas uzata ankaŭ kun la finaĵoj **-a**, **-e**.

Ekz.: Miaj gepatroj loĝas en la **apuda** urbkvartalo. La **apude** pendanta pentraĵo montras maran pejzaĝon. Subskribu ĉi-**apude!** Vidu, ĉi-**apude!**

La prepozicio apud funkcias ankaŭ kiel prefiksoido: apudurba ĉirkaŭaĵo, apudvoja aŭtoparkejo, apudesti, apudiri, apudstari, ktp.

Rimarko: Laŭ PAG (p. 263) ekzistas nenia motivo kontraŭ uzado de la prepozicioj **apud** kaj **ĉe** kun akuzativo.

Ekz.: stari **apud** la muro — iri **apud** la muron; stari **ĉe** la muro — iri **ĉe** la muron. Same: loĝi **ĉe** iu — transloĝiĝi **ĉe** iu. Logike do oni povus diri ankaŭ: venu **ĉe** min (en mian domon), sed la tradicio rigardas tian uzon nekorekta kaj aplikas diri: venu **al** mi.

Jen kelkaj proverboj kun la prepozicioj **ĉe** kaj **apud**:

Eĉ ĉe kokino troviĝas propra inklino.

Ĉe tablo malplena babilo ne fluas.

Ĉe tro ĝentila ekstero mankas ofte sincero.

Ĉe vulpoj ĉiam naskiĝas nur vulpoj.

Restu tajloro ĉe via laboro.

Ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo.

Kvina rado ĉe veturado.

Laŭdu belecon de l' maro, sed ĉe rando de arbaro.

Apud plena manĝotablo, ĉiu estas tre afabla.

Pli bona apude najbaro, ol frato post arbaro.

Apud propra domo ŝtelisto ne ŝtelas.

Christian Pinard

Kia Eŭropo, kia mondo bezonas Esperanton?

Tiun strangan demandon naskigis la legado de lastricevitaj ĵurnaloj: francaj esperantistoj denove peticias por enirigi Esperanton al la bakalaŭro... hungaraj samideanoj proponas enirigi Esperanton en la mezlernejoj... ĉieaj esperantistoj ĝojas pro la elekto de pola esperantistino en la Eŭropa Parlamento... germana firmeĝo trudas sian laboristaron labori po 40 horoj semajne pagitaj 35 h, minacante translokiĝi la entreprenon al Pollando (post tiu „sukceso”, ili proponas eĉ redukti la feriajn tagojn po unu semajno)... hispanaj agrikulturistoj ne plu dungas siajn laboristojn en Maroko sed en Mezeŭropaj landoj, pro malmulta kosto (jam delonge ili ne plu dungas en Hispanio)... la eŭropaj balotoj interesis malpli ol 45% de la eŭropanoj (ĉu pli ol la duono opinias do, ke baloti estas neutila agado por ŝanĝi ion?)... la franca firmao Dassault aĉetis egan francan ĵurnalaron (fabrikanto de armeoj aĉetante firmaojn de ĵurnaloj, kian liberecon havos la ĵurnalistoj?)...

Mi povus daŭrigi la liston, jam sufiĉas. Io estas putra ankaŭ en Eŭropo, sed tio ne estas novaĵo, opiniis mi kiel civitano. Io estas erara ankaŭ en la Movado, kaj tio ĉagrenas min, opiniis mi ĉifoje kiel esperantisto.

En Francio, la unua propono por enirigi Esperanton en la lernejoj okazis la jaron 1907, sensukcese; antaŭ la SDN tio okazis la jaron 1921, sen pli da sukceso. La pasintan jaron, eŭropaj deputatoj vane proponis Esperanton por Eŭropo... Tiom da malsukcesoj malĝojigas kaj senesperigas gesamideanojn.

Proponante Esperanton al la naciaj registaroj, al la oficialaj institucioj, ĉu ni celas la taŭgan publikon? La politikistoj ne bezonas komunan lingvon, ili jam havas armeon de tradukistoj, pagitan per niaj impostoj... La estroj de la firmaoj jam havas sian komunan lingvon, tiun de la mono, de la potenco: la anglan lingvon. Kiujn avantaĝojn havus la politikistoj kaj la firmestroj, se ili oficialigus Esperanton? Per Espe-

ranto, la popoloj parolus unuvoĉe, vera civitana potenco naskiĝus kontraŭ la politika kaj „mona” potenco; „dividi kaj regni”, jen ĉiama sentenco, kaj inciti la popolojn lerni Esperanton estas tute mala celo.

Jen kialo de la malsukceso de la proponoj por oficialigi Esperanton: ni proponas ĝin al tiuj, kiuj la plej timas la sukceson de la lingvo, tiuj, kiuj la plej perdis se Esperanto sukcesus. La estroj de nia nuna mondo ne plu estas tiuj, kiuj kreis la „Societon de la Nacioj” aŭ la „Ruĝan Krucon”. La nunaj estroj de l’ mondo obeas la povon de la mono, de la firmaoj: rigardu, kiu gajnis monon dank’ al milito en Irako, kaj vi vidos la verajn celojn de tiu moderna epopeo...

Ni lasu do la politikistojn, nenion ili faros por helpi la popolojn aŭ kontraŭi la povon de la firmestroj. Tiuj, kiuj bezonas nian komunan lingvon estas tiuj, kiuj ne havas povon por sin defendi kaj spertas la decidojn de la povuloj. Ili estas disaj, do malfacile atingeblaj. Ankaŭ tie, nenio ŝanĝis ekde Zamenhof; sed denove, „nova sento venas en la mondon”.

Civitanoj ariĝas por aŭdigi sian voĉon — almenaŭ en tiuj partoj de l’ mondo kie serĉi ion por tagmanĝi ne estas la plej grava okupo (sed agante, tiuj helpas tiujn ĉi). La Socia Forumo, internaciaj asocioj, mondaj grupiĝoj de civitanoj laŭte diras: „alia mondo eblas”. Ili konas jam la problemon de la lingvo por interparoli; sed ili ne havas tradukistojn por solvi tion, kaj ili ofte

rifuzas la anglan lingvon pro la ideoj kiujn ĝi aludas. Jen la publiko kiun ni devas celi.

Humanismo, interkompreniĝo, internaciismo, iliaj ideoj kongruas kun la ideoj de Esperanto; ilian lingvan problemon ni povas solvi.

Sed tio postulas radikan ŝanĝon ĉe niaj movadaj estraroj. Ni ne plu zorgu demandojn por Esperanto antaŭ la registaroj aŭ la oficialaj institucioj: aŭ ili ne volas la sukceson de nia lingvo, aŭ ili ne havas povon por trudi ĝin. Ni lekas ekde jaroj la piedojn de tiuj povuloj, por rezulto nula; ni atendas ekde jaroj en la antaŭĉambroj de la povo, sed la povuloj rigardas nin kvazaŭ lakeojn. Ni retrovu nian fierecon; ni forlasu neŭtralecon. Ni iru ĉe la neoficialaj, internaciaj asocioj, ni iru ĉe la altermondialistoj, ni iru tien, kie oni bezonas kaj atendas komunan lingvon kiu ne estas tiu de l’ povo.

Certe, tio estas nek la plej rekta nek la plej taŭga vojo al la oficialaj aperitivoj aŭ la honoraj medaloj. Sed tio estas la vojo por sukcesigi Esperanton en nia nuna mondo: ni donu ĝin al tiuj, kiuj bezonas ĝin, ne al tiuj, kiuj mokas ĝin.

La mondo, Eŭropo, kiu bezonas Esperanton ne estas la registara sed la civitana.

Ni iru ĉe la civitanojn, ne plu ĉe la registaroj!

**Christian Pinard
Prada, la 11an de julio 2004**

Pekina Deklaro

La 89a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Pekino, Ĉinio, de la 24a ĝis la 31a de julio 2004 kun 2031 partoprenantoj el 51 landoj,

- traktinte la temon „Lingva egaleco en internaciaj rilatoj”;
- notante, ke la jaro 2004 markas 50 jarojn da oficialaj rilatoj inter UEA kaj Unesko,
- memorante, ke rezolucioj de Unesko notis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo kaj rekonis, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko,
- notante la „Raporton pri Homa Evoluigo 2004” de la Evoluiga Programo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu asertas, ke la libereco de esprimado kaj la uzado de lingvo estas nedisigeblaj,
- alte taksante la agadon de la ĉina registaro, kiu, cele al pli justa kaj diverseca aliro al internacia interkompreniĝo, subtenas la instruadon kaj utiligon de Esperanto, konforme al la spirito de la rezolucio de Unesko,

DEKLARAS

- ke demokratia kaj egalrajta komunikado en internaciaj rilatoj estas

esenca por internacia interkompreno kaj paca kunlaboro surbaze de egalaj lingvaj rilatoj,

- ke estas bezonata nova internacia lingva ordo, kiu garantiu egalecon, diversecon kaj demokration en lingvaj aferoj kaj efikan komunikadon inter nacioj kaj aliaj homgrupoj lingve malsamaj, ĉar en la nuna monda lingva situacio, kun kreskanta superrego de iuj lingvoj super aliaj, ne eblas realigi tiujn principojn,

- ke neŭtrala komuna lingvo estu kerna elemento en tiu ordo, por atingi unuecon en diverseco inter la diversaj lingvoj kaj kulturoj je internacia nivelo,

- ke sekve la internacia lingvo Esperanto, pruvinte dum pli ol cent jaroj siajn utilecon kaj praktikecon, meritas seriozan konsideron fare de internaciaj organizoj, ties membro-ŝtatoj kaj ĉiuj personoj kaj organizaĵoj de bona volo, kiuj respektas kaj deziras pacon kaj pacan kompreniĝon en egaleca etoso en nia hodiaŭa mondo,

- ke por krei novan internacian lingvan ordon, kiu kontribuos al internacia kompreno kaj mondopaco, necesas forte subteni la enkondukadon de Esperanto en lernejojn, konforme al la

spirito de la Unesko-rezolucioj, ĉar tio faciligas lingvolernadon ĝenerale kaj antaŭenigas internaciecan aliron al la mondo.



La nova estraro de UEA elektita en Pekino

En sia unua kunsido en Pekino sabate la 24an de julio 2004, matene, la nova komitato de UEA reelektis la prezidanton de UEA, Renato Corsetti, por nova trijara periodo.

Kiel vicprezidanto estis elektita Claude Nourmont, komitatano A por Francio, kaj kiel Ĝenerala sekretario Ulla Luin, kiu unue estis elektita komitatano C. Por tiuj postenoj ne estis alternativaj kandidatoj.

La konsisto de la nova estraro estas jena (en krampoj nombro de ricevitaj voĉoj):

- Renato Corsetti, prezidanto (30)
- Claude Nourmont, vicprezidanto (31)
- Ulla Luin, ĝenerala sekretario (32)
- Ans Bakker ten Hagen (33)
- Maritza Gutierrez (26)
- Amri Wandel (24)
- Yu Tao (30)

POMERIO — PONTO INTER GERMANOJ KAJ POLOJ

Jen la ĉefa temo de la 81a Germana Esperanto-Kongreso, okazinta en la tagoj 28–31 de majo 2004 en la belega kaj gastama urbo Neubrandenburg, situanta 130 km norde de Berlino.

La Kongreson, kun riĉa E-programo, partoprenis 160 gesamideanoj el 10 eŭropaj landoj (DE, PL, DK, GB, NL, LT, MD, HU, CZ, CH). Inter eksterlandaj partoprenintoj troviĝis multnombra pola grupo konsistanta el 14 esperantistoj (Szczecin — 7, Malbork — 4, Koszalin — 2, kaj Poznań — 1).

La kongresejo, troviĝanta en la urbocentro („Hotel am Ring”), estis facile atingebla por ĉiuj kaj garantiis bonegajn restad- kaj debatkondiĉojn.

Antaŭ solena malfermo de la Kongreso okazis gazetara konferenco kaj planto de Esperanta kverko-arbo en la Eŭropa Parko (fare de polaj geamikoj). Poste ĉiujn kongresanojn akceptis urbo-prezidentino s-ino Dolores Brunzendorf.

Precize je la 18.00 komenciĝis solena malfermo de la Kongreso (kun salutvortoj de gastoj). La salutvortojn transdonis i.a. Prof. d-ro Alfred Gommelka kaj d-ro Heinz Kindermann (membroj de EU-Parlamento), s-ino Sylvia Bretschneider (prezidantino de la Landa Parlamento Meklenburgo Antaŭpomerio), d-ro Paul Krüger (Ĉefa Urbestro).

Kadre de interkona vespero belajn kantojn kun plaĉa muziko prezentis s-

–ro Ralph Glomp el Hamburgo. La sekvontan tagon (29.05) je la 9.30 okazis la V Pomeria Esperanto–Renkonto kun du festprelegoj pri la kongrestemo. Prelegis mag. Czesław Baranowski (Pollando) kaj d–ro Till Dahlenburg (Germanio).

La unua preleganto forte eksponis la amikan kunlaboradon inter polaj kaj germanaj esperantistoj, komenciĝintan en la 1971 jaro. Li substrekis, ke ĝuste tiam esperantistoj el du ĝemelaj urboj Neubrandenburg kaj Koszalin starigis la unuajn pilierojn por nevidebla Pomeria Ponto, kiu ligas nun poilojn kaj germanojn.

Post la prelegoj sekvis urbovizitado kun E–ĉiĉeronoj, tagmanĝo kaj fakaj kunvenoj pri diversaj temoj. Antaŭ festa vespermanĝo okazis Diservo kaj je la 20.00 komenciĝis bunta vespero kun plaĉaj kantoj en Esperanto.

La 30an de majo antaŭtagmeze okazis Jarkunveno de Germana Esperanto–Asocio kaj posttagmeze ĉiuj partoprenis en impresplenaj ekskursoj: al Anklam ĝis Klempenow kaj al Stargard ĝis Neustrelitz.

Post vespermanĝo sekvis muzika spektaklo, preparita de kelkaj regionaj aŭtoroj (Gunter Ebert, Annegret Voss, Hans–Joachim Oldenburg), kaj je la 21.30 komenciĝis dancvespero ĉe akompano de bona orkestriono. La orkestrionon ludis kaj plaĉe kantis koŝalina muzikisto Stanisław Stokrocki, varmege aplaŭdata de ĉiuj dancemuloj.

La 31an de majo antaŭtagmeze oka-

zis denove fakaj kunvenoj pri diversaj temoj kaj poste sekvis solena fermo de la Kongreso kaj adiaŭa tagmanĝo.

Ne estas dubo pri tio, ke la 81a Germana Esperanto–Kongreso kaj la V Pomeria Esperanto–Renkonto plene sukcesis. Pri organiza kaj esenca flankoj de la aranĝoj zorgis: Christian Darbellay (GEA–komisiito) kaj Werner Pffennig (prezidanto de Landa Asocio Meklenburgio–Antaŭpomerio).

Dum la tuta Kongreso funkciis libroservo kaj ekspozicio de esperantaĵoj.

En la riĉaj kongresaj materialoj troviĝis ankaŭ informilo pri laŭvica 82a Germana Esperanto–Kongreso, okazonta en Bad König en la tagoj 5–8 de majo 2005. **En tiu ĉi informilo aperis jam interesa informo:**

La Kongreson partoprenos specialaj gastoj, i.a. Aleksander Korĵenkov (*Redaktoro de La Ondo de Esperanto*), Herbert Mayer (*Direktoro de E–Muzeo Vieno*), Prof d–ro Reinhard Selten (*Nobelpremiito*) kaj Georgo Handzlik (*fama kantisto*). **Informojn petu:**

Esperanto–Kiel@web.de

Czesław Baranowski



ĈEBALTA ESPERANTISTA PRINTEMPO TRE ATRAKCIAS

En la tagoj 15–23 de junio 2004 jaro okazis en Mielno **la 26a Ĉebalta Esperantista Printempo**, partoprenita de preskaŭ 50 esperantistoj el 9 Eŭropaj

landoj. Jam la dekduan fojon la aranĝo estiĝis en la gastama, bele situanta Ripozcentro de Popolaj Sportteamoj, nomata ofte „Sporta Hotelo”.

La ĉefa celo de la aranĝo estis praktika utiligado de la lingvo internacia, havanta ja ŝancon fariĝi pontolingvo en Eŭropa Unio. Pri internacia karaktero de la aranĝo atestis naciaj flagoj de ĉiuj landoj, el kiuj venis gesamideanoj. Ekspontitaj ekstere, ili gaje flirtis en la vento kaj kune kun Esperantaj flagoj ornamis blankajn panelojn, sur kiuj videblis verdkoloraj surskriboj: **Ĉebalta Esperantista Printempo kaj Eŭropa Unio bezonas la lingvon Esperanto.** Pli grandaj Esperantaj flagoj estis pendantaj sur du altaj mastoj en la centra parto de Mielno.

Neforgeseblajn impresojn lasis post si la solena inaŭguro de la 26a ĈEP kun plaĉa distra programo. Dum la solenaĵo, partoprenita ankaŭ de koŝalinaj esperantistoj kaj honoraj gastoj, ĉiuj sidlokoj en bele dekoraciita kurnvenejo estis okupitaj.

La kunvenintojn varmege bonvenigis Czesław Baranowski, ĉeforganizanto de la aranĝoj ekde 1991 jaro kaj samtempe prezidanto de PEA–Filio en Koszalin. En la inaŭgura parolado li esprimis sian grandan ĝojon pro la renkonto kun malnovaj kaj novaj gesamideanoj, inter kiuj troviĝis meritplenaj polaj esperantistoj: Zofia Banet–Fornalowa kaj Jerzy Fornal.

Al ĉiuj ĈEP–partoprenantoj estis fluantaj liaj afablaj vortoj kaj bondeziroj. Ne mankis kortuŝaj momen-

toj dum la solenaĵo, pri kiuj oni devas almenaŭ mencii. Okaze de la deka sinsekva aktiva partopreno en ĈEP–aranĝoj belegajn diplomojn en verdaj bindaĵoj ricevis: Lidia Bogusz, Henryka Drabik kaj Mirosława Gaŝiorowska. Du gesamideanoj Evelyne Chibleur (FR) kaj Gunter Ebert (DE), kontribuantoj de kelkaj jaroj al la programo per interesaj prelegoj kun videofilmoj, ricevis ankaŭ belegajn diplomojn okaze de la kvina sinsekva partopreno en ĈEP–aranĝoj.

En la distra parto de la solenaĵo plaĉajn kantojn en Esperanta kaj pola lingvoj prezentis junulina koruso el Koŝalina Kulturcentro, gvidata de Ewa Turowska. La korusanoj estis varmege aplaŭdataj de ĉiuj do volonte bisis kelkajn kantojn.

Post bongusta vespermanĝo sekvis tradicia, interkona vespero kun dancado ĉe akompano de bona muziko. Koŝalina muzikisto Stanisław Stokrocki plaĉe ludis orkestrionon kaj kantis popularajn kantojn, ne nur en la lingvo internacia. Kadre de tiu ĉi vespero okazis interesa konkurso pri dancado kun valoraj premioj. Premiitaj estis tri danĉparoj: Henryka Drabik–Józef Giercarz, Zofia Banet–Fornalowa–Jerzy Fornal, Yadviha Piatrouskaya (BY)–Karl Bielenberg (DE).

La vesperon variigis prezentado de arabaj dancoj fare de germana esperantistino Hannelore Brunow, ĉe akompano de speciala muziko. La sekvontan tagon komenciĝis realigo de sufiĉe riĉa kaj varia ĈEP–programo, en kiu

troviĝis inter alie: interesaj prelegoj kaj plaĉaj spektakloj, filmoprezentado, gaja kantado kun akordiona akompano, lingvoperfektigado, ktp. ktp. Al realigo de tiu ĉi riĉa E-programo kontribuis: Zofia Banet-Fornalowa, Jerzy Fornal, Urszula Giercarz, Werner Pfennig (DE), Gunter Ebert (DE), Evelyne Chibleur (FR), d-ro Tadeusz Leżak, Libuše Filipova (CZ), Hannelore Brunow (DE) kaj Andrzej Grzybowski (kun korusanoj „Mareski” kaj „Krajna”).

Specialan atenton meritas bonega aktorado de Jerzy Fornal, kiu prezentis al ĈEP-partoprenantoj du poziciojn el sia riĉa repertuaro. Tre plaĉis al ĉiuj la spektakloj: „VIRINO — KVAR BILDOJ” (konsistanta el am-poezio de diversnaciaj poetoj) kaj „LA ARLEKENO” — laŭ Janusz Korczak. Intere prelegis Zofia Banet-Fornalowa, prezentante la vivon kaj agadon de Lidja Zamenhof.

Tre atrakciaj estis du ekskurso-taĝoj, dum kiuj ekskursantoj vizitis Świdwin, Połczyn Zdrój, Białogard, Koszalin kaj Strzekecin. En Świdwin vizitata estis de ili bela kastelo kun ronda kasteluro (el XIII/XIV jc.) kaj moderna objekto de novkonstruita Akvo-Parko „Relaks”. En Koszalin ĉiuj vizitis la plej grandan komercan kaj distran centron, la plej modernan preĝejon de S-ta Spirito kaj la historian katedralon de S-ta Maria, (el XIV jc). Vizitante la urbocentron esperantistoj ariĝis ĉe la memorŝtono omaĝe al d-ro Ludoviko L. Zamenhof, por tie meti belajn

florojn.

Poste ĉiuj forveturis al proksime situanta vilaĝo Strzekecin, en kiu troviĝas belega parko kun du vizitindaj palacoj (blanka kaj sukkena), adaptitaj por turismaj bezonoj. Surpriza pluvego ne permesis tamen al ekskursantoj viziti la parkon kun la blanka palaco, sed en la sukkena palaco ĉiuj havis okazon kafumi kaj manĝi bongustajn glaciaĵojn, atendante veterpliboniĝon.

Kvankam la vetero ĉi-jare ne favoris al sunbruniĝado, en la gastama Sporta Hotelo rapidege fluis la tempo kaj neniu enuis. En la verda korto troviĝis multaj sidlokoj por ripozigi, kanti ekstere kaj konversacii en la lingvo internacia.

Al ĈEP-partoprenantoj tre plaĉis ankaŭ aliaj atrakcioj, meritantaj atenton:

— vizitado de Mielno–Unieście per speciala, malekspresa trajno sur pneŭmatikoj,

— promenado tra Jamno-lago sur la ferdeko de motorboato „Mila”,

— la dua dancvespero ĉe bona muziko kaj plaĉa kantado fare de Stan. Stokrocki,

— korvarmiga adiaŭa vespero ĉe bivakfajro kun kolbasetrostado, biertrinkado, gaja kantado kaj komuna dancado ĝis malfrua nokto. Ĉirkaŭe de la brulanta fajro ariĝis ne nur ĈEP-partoprenantoj, sed ankaŭ multaj koŝalinaj esperantistoj. Kadre de tiu ĉi vespero varmege aplaŭdata de kunvenintoj estis ankaŭ prezentado

de fakirarto.

Oni devas substreki, ke pri la aranĝo tre interesiĝis redaktoroj de amas-komunikiloj, ke en la lokaj gazetoj aperis kelkaj artikoloj kun fotoj, ke E-Redakcio de Pola Radio kaj la loka radiostacio informis geaŭskultantojn pri tio, kion faras esperantistoj en Mielno.

La lastan tagon, dum tradicia sumigo de la aranĝo, ĉiuj esprimis sian kontenton pro la bonega organiza flanko de ĈEP, pro la riĉa E-programo kaj pro neripetebla Esperantista etoso.

Al tiu ĉi konciza raporto la aŭtoro aldonas la jenajn vortojn:

Venontjare, ankaŭ en junio,
se permesos al vi bona Dio,
valizeton vian kunprenu
kaj denove Mielnon revenu.

La 27 ĈEP okazos en la tagoj 15-23 de junio 2005. Oni povas ricevi ĈEP-informilon sendante retroŝtan mesaĝon al: barslavo@wp.pl

Czesław Baranowski



Junulina kantensemblo el la Urba Kulturcentro agrabligas la solenan inaŭguron.

Rezolucio de Konferenco de la Universitat-rektoroj el la dek novaj membroŝtatoj de Eŭropa Unio okazinta en Lublino, Pollando, 2004-04-28

La Konferenco de Rektoroj en Lublino

Konscia pri la bezono serĉi novajn kaj pli efikajn solvojn en la kampo de lingva komunikado en la unuiganta Eŭropo kaj en la tuta mondo;

Konsiderante ke tia alternativa solvo devas esti bazita sur la principo de egaleco kaj respekto de la lingvo kaj kulturo de ĉiuj nacioj kaj membroŝtatoj;

Konstatante ke tia solvo estas neŭtrala lingvo Esperanto, kiu pruvis esti viva lingvo dum la periodo de pli ol unu jarcento de ties apliko;

Instigas eŭropajn universitatojn enkonduki instruadon de Esperanto kaj disvastigi ties aplikon en diversaj kampoj de la vivo;

Kaj invitas universitatojn de aliaj landoj aliĝi al tiu iniciativo.

Sendis: Renato Corsetti

[red] Ni tre ĝojas pri la okazinta konferenco kaj eblaj ties postsekvoj.

Ni tre malĝojas, ke — kiel kutime! — la informo venas post kelkaj monatoj kaj ne rekte el la fonto, sed tute akcidente, el interreto. Ĉu vere la pola kutimo?

Maĝorzata Handzlik elektita Eŭrodeputito!

Karaj,

dankEGon pro la gratulsalutoj, okaze de mia elekto al Eŭropa Parlamento, kiujn mi ricevas ĉiuhore. Ili venas de samideanoj de tuta mondo. La intereso pri mia persono nun fariĝis pli granda ol mi povis imagi. Dankegon al vi ĉiuj. Pro multeco da mesaĝoj mi ne kapablas detale respondi al ĉiu. Jen la komuna letero en kiu mi provos respondi al starigitaj ĝeneralaj demandoj.

Mia nomo estas Maĝorzata Handzlik, esperantistoj nomas min Margareta. Mi estas edzino de Georgo Handzlik — la esperanta kantisto, verkisto, eldonisto kaj instruisto. Esperanton mi parolas 20 jarojn. Mi vizitis UK-ojn en Berlino kaj Mondperliero, krome multajn lokajn aranĝojn. Dum du monatoj mi kun mia falilio estis en Brazilo envititaj de gesinjoroj Grattapalia, el Bona Espero. Mia TTT-paĝo: www.Malgorzatahandzlik.com

[...] En Eŭropa Parlamento mi agos en la plej granda frakcio EPP Eŭropa Popola Partio.

Kelkaj samideanoj skribis, ke mi estas la unua esperantisto — membro de Eŭropa Parlamento. Mi ne kontrolis tion. La kampanjon ni faris dum du monatoj kaj mi gajnis unu el plej bonaj rezultoj en la lando.

Dankon pro sugestoj, ke mi zorgu en EP pri Esperanto. Tio evidente estas unu el miaj intencoj. Por efikdone agi

mi nun volas aliĝi al la Komisiono pri Kulturo Edukado, Junularo kaj Sporto kiu inter la aliaj okupiĝas pri lingvoj. Tio fakte ne estas facila tasko, ĉar estas multaj volontuloj al la komisiono. Kaj la decido apartenas ne nur al la parlamentano, sed ankaŭ al la partio.

Krom salutoj venis al mi kelkaj mesaĝoj kun proponoj kunlabori internacivele pri kulturo, ankaŭ venis al mia retadreso kelkaj gratuloj al Civitana Platformo pro elekto de esperantistino al EP. Mi prezentos ilin al la estroj de la partio, eble tio subtenos miajn strebojn eniri la Komisionon pri Kulturo.

Krom esperantaj amikoj en ĉiuj eŭropaj landoj mi havas aliajn kompetencojn por la Komisiono pri Kulturo, Junularo Edukado kaj Sporto, pro la jenaj faktoj:

- jam dudek jarojn mi gvidas radion
- mi fondis instituton por instrui instruistojn,
- mi fondis lingvo–lernejon
- mi profesie laboris en skolta movado.

Mi estos dankema pro ĉiu mesaĝo kun propono kunlabori sur kultura kampo internacia.

Se mi eniros la Komisionon pri Kulturo mi havos realan ŝancon ple-di por Esperanto. Tiam volonte mi diskutos kaj renkontiĝos kun ĉiuj, kiuj havas spertojn pri lobingo por Esperanto ĉe EP.

Sincere

Margareta Handzlik
Eŭrodeputito

14. Eŭropa E-Forumo

Dum 11–18 de junio 2004 okazis 14 Eŭropa Esperanto-Forumo organizita de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz kaj S-ro Marcel Delforge, kiu kun E-grupo el Charleroi aranĝis bonegan restadon en Belgio. La vojaĝon kaj la Forumon partoprenis ĉefe tri polaj ensembloj: Folkloro horuso „Mareści” el Cewice en Kaŝubio, Ensemblo „Krajna” el Kamień Krajeński kaj E-horuso „Gaja Velo” el Gdynia. Veturante al Belgio oni vizitis Berlinon kaj Luksemburgon.

Dum la restado en Belgio (12–17 de junio) okazis vojaĝoj al Ostende kaj Bruĝo kun ŝipekskurso tra kanaloj de Bruĝo kaj kun bonega E-gvidado tra ĉarmaj stratetoj de mezepoka Bruĝo. La 14an de junio la ensembloj vizitis Parizon kaj la 15an de junio — Charleroi kun koncerto por esperantistoj kaj membroj de Pola-Belga Societo de Amikeco.

Samtempe okazis vizito en Waterloo lige kun datreveno de la Batalo la 18an de junio 1815 j.

La 16an de junio oni koncertis en lernejo kaj vizitis European Komisionon kaj Parlamenton en Bruselo kaj ankaŭ kun bona E-gvidado la Bruselan Parlamenton kaj ĉefurbon de Belgio.

Vizito en Botanika Ĝardeno en Huzingen kaj amika adiaŭa vespero kun belgaj esperantistoj fermis la Forumon.

Revenante el Benelukso la ensembloj vizitis survoje Antverpenon, Rot-

terdamon kaj Amsterdamon, kie ĉefe impresis ŝipekskursoj tra kanaloj de „Venecio de Nordo”. Lastan tagon (la 18an de junio) oni vizitis Hamburgon kaj fine koncertis en Mielno apud Koszalin por pli ol 50 partoprenantoj de la 26a Ĉebalta Esperantista Printempo (ĈEP), kiuj ĉijare venis el 10 landoj. La aranĝon jam de 26 jaroj bonege organizas Czesław Baranowski.

Ĉiuj revenis tre kontentaj, planante novajn Esperanto-vojaĝojn en 2005 jaro, ankaŭ fine de junio 2005 al la 15a Eŭropa Esperanto-Forumo en Benelukso kaj Parizo.

Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz
www.esperanto-turismo.com



Katolikoj kongresis en Kretinga

Por la ĉijara kongreso de IKUE estis elektita litova urbeto Kretinga. Ĝi situas dekkelkajn kilometrojn de Balta Maro kaj iom plu de pli fama havenurbo Klajpeda. Organizantoj de la 57a IKUE-Kongreso proponis fakte belan, trankvilan urbeton kun ties riĉa historio. Temo de la kongreso „Venku malbonon per bono” ankaŭ koincidis kun kongresurbo.

Krom diversaj religiaj kaj konstantaj kongresaj programeroj organizantoj proponis ĉijare kelkajn interesajn ekskursojn al la fakte vizitindaj lokoj.

Ĵemajta Kalvarija kun dudekstacia krucvojo, kie oni povas trapasi vo-

jon de suferoj de Kristo, salutis partoprenantojn per pluvo. Interesa estas la fakto ke en la loka preĝejo krom dekkelkaj pastroj—esperantistoj, la sanktan meson celebris tri episkopoj, kio ne okazas tiel ofte.

En Ŝiluva, konata pro la fakto, ke tie komence de XVII jarcento al junaj paŝtistoj aperis Dipatrino. Ŝtonoj sur kiuj tio okazis estas ĝis nun en speciale konstruita kapelo apud altaro.

Gekongresanojn salutis episkopo, kiu por tiu celo venis speciale el Kaŭnas. Survoje ni vizitis kelkajn aliajn interesajn lokojn ne nur religiaj, kiel „ŝtona parko kaj muzeo”. Sed por partoprenantoj la plej grandan impreson postlasis mondkonata „La monto de krucoj”. Ĝi estas la simbolo de suferoj de litovoj, ilia sopiro pri sendependeco kaj espero. Kvankam dum soveta reĝimo tiu simbolo de katolika kredo iĝis nedezirinda, foje bruligita, nun oni kalkulas, ke sur la monto estas pli ol 100 mil da diversgrandaj krucoj. Monton en septembro 1993 vizitis kaj celebris tie sanktan meson la Papo Johano Paŭlo la II.

Oni povas diri, ke en Litovio multaj lokoj estas ligitaj kun Maria, Dipatrino. En tridekaj jaroj de la XX jarcento la tuta Litovio estis konsekrita sub protekton de la Sankta Virgulino Maria, kaj ekde tiam oni nomas Litovion — la Tero de Maria. Krome IKUE-anoj povis aŭskulti multe da interesaj prelegoj, rigardi filmojn pri Litovio, lerni bazan CSEH—kurson, partopreni en prezentado de lokaj folkloraj grupoj, ĝui neforgeseblajn momentojn

dum la koncerto de ĉarma, infana grupo el Kaŭnas, viziti la ĉebaltan ripozlokon Palanga, gustumi bonan bieron el loka bierfarejo, aŭ ĝoji rigardante ĉe la solena fermo artajn fajraĵojn.

Bona organizado, multe da interesaj materialoj, kiujn ricevis ĉiu partoprenanto, dediĉemo de organizantoj, postlasos en la memoro de partoprenantoj neforgeseblajn momentojn travivitajn en bela, trankvila kaj verda lando — Litovio.

Stanisław Mandrak



Impresoj de Esperantaj Tagoj en Pelplin

„Bonvenon en Pelplin, sankta ĉefurbo de Kocjovie—regiono” — per tiaj vortoj Jadwiga Wasiuk — prezidantino de loka Esperanto—Asocio salutis la 8an de majo 2004 alvenintan de Gliwice Stanislavon Mandrak kaj kunvenintajn estraranojn, bonkore invitante ĉiujn al gastoĉambro de loka lernejo. — Kafon aŭ teon ? — demandis ŝi afable. — Nur panon, frandaĵon kaj pri Kocjovie novaĵon — laŭte kaj ride me petis prezidanto de Pola Esperanto—Asocio, oportune sidigante en la gastoĉambro.

— Unue Esperanto parolata kun kafo kaj kukoj, sed poste dum vespermanĝo la pano kun frandaĵoj de Kocjovie — energie ordonis gastema organizantino de la IV Printempa Esperanto—Renkonto en Pelplin. Kaj tiel komenciĝis „interkona vespero” de ga-

stoj alvenintaj el Gdansko, Malborko, Gliwice, Cieszyn, Sosnowiec, Zabrze kaj eĉ el Ruslando kaj Japanio.

Malfavora vetero tute ne influis ĝisnuktomezan, komunan babiladon ofte interrompatan de spicitaj humuraĵoj kaj ĉetabla kantado.

Por prezidanto kaj estraranoj de PEA alveno al Pelplin estis ekskluzive determinita por labora kunsido de la Ĉefa Estraro, sed festo-programo pripen-se prilaborita de Jadwiga Wasiuk, permesis al estraranoj partopreni preskaŭ ĉiujn programerojn ligitajn kun promociado de la urbo kaj regiono.

Partoprenantojn de la Printempa Esperanto-Renkonto en Pelplin atendis sabate sankta meso, celebrata de pastro Józef Zielonka el Tarnów omaĝe al episkopo-esperantisto Konstanteno Dominik, rememora sesio pri lia eklezia vivo, postmesa vizitado de seminaria biblioteko kaj fama pelplina katedralo. Fine, arta programo ligita kun Kocjowie-regiono en loka lernejo.

Neglektante pluvan matenon ĉiuj piede kaj veture rapidis al pelplina katedralo por partopreni Esperantan sanktan meson, sed same kiel historiaj pilgrimantoj devis travivi misteran etoson kreitan de grandioza historia konstruaĵo fondita en 1289 kaj finkonstruita en 1557 de cisterciana ordeno, kiu venis Pollandon de Francujo.

La monumenta fasado de historia katedralo surgenuigas eniranton per sia majesta arkitekturo kaj gotika severo. Ĉiu enirinto profunde perceptas ascezan influon de alte masonitaj mu-

roj kronitaj de kristalvolboj kaj dokumentitaj de historiaj ekipaĵoj, kiel: portalo, altaroj, orgenoj, ambono, stalaĵoj, tomboj, bildoj kaj skulptaĵoj. Aldone impresis esperantistojn antaŭmesa renkonto kun Lia Ekscelenco episko Johano Bernardo Szlaga, kiu favore rememoris evangelizan mision de la episkopo Konstanteno Dominik inter esperantistoj kaj substrekiis integran rolon de Esperanto en unuiĝanta Eŭropo. En nomo de katolikaj esperantistoj animzorganto pastro Józef Zielonka dankis al Lia Ekscelenco por honoro celebri Esperantan meson en tiel historia sanktejo kaj por favora rilato de la episkopo al esperantista medio. Post la sankta meso partoprenantoj havis neripeteblan okazon aŭskulti orgenan koncerton de „antikva muziko” majstre luditan de katedrala organisto Dario Wierucki.

Plenigitaj de Bach'a muziko la verdaj partoprenantoj transiris al apuda ĉekatedrala porpastra seminario kie en kela refektorio dum kafopaŭzo ili preparoladis kun gastigantaj pastroj kaj urbaj aŭtoritatoj aktualan kaj perspektivan ŝancon de pelplina E-movado.

La gastoj invititaj al seminaria aŭditorio ekaŭdis referaĵojn pri eklezia kaj „verda” agado de episkopo Konstanteno Dominik, prezentitaj de vicdirektorino de la seminaria biblioteko kaj varsovia studentino Katarzyna Tempczyk. La sesion resumis neatendita salutparolo de pelplina urbestro Andrzej Stanuch, kiu samtempe oficiale

honorigis per urba diplomo Esperantan aktivecon de Jadwiga Wasiuk, kion ĉeestantoj spontane kaj longe aplaŭdis ne forgesante pri ŝia funkcio en Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio.

Sekva programero ligita kun vizitado de seminaria biblioteko speciale allogis novajn vizitantojn, kiuj eĉ ne suzozis ekvidi tiel interesajn trezorojn kiel: unika en Eŭropo biblio de Gutenberg, mezjarcentaj inkunabloj, mapoj kaj specialaj teknikoj konservi t.n. antikvaĵojn.

Post eliro el la biblioteko kaj trairo de „episkopa ĝardeno”, kie post „longa vizitado” kvazaŭ ripozis en fotelo apud rivero ŝtona figuro de Johano Paŭlo la II, partoprenantoj metis florkronon sur la tombon de la episkopo Konstanteno Dominik kaj tiel finiĝis oficiala parto de la Esperanto-Renkonto.

Lacigitaj de historiaj rememoroj, partoprenantoj avide atendis ĉetoble en la lernejo artan prezentadon de regiona junulara ensemblo — „Modraki”, kiuj kun muzika akompano deklame, kante, dance kaj aktore prezentis regionan popoltradicion en Esperanto. Ĉu oni bezonas aldoni, ke gastoj priservataj de kocjevaj frandaĵoj, senĉese aplaŭdadis la junan generacion de sekvontaj esperantistoj kaj benediktan laboregon de la organizantino kaj kunhelpantoj? De tempo al tempo aŭskultantoj kunkantis kun junularo por saturiĝi per regiona etoso, kiu estas ja neripeteble unika.

Por kompreni aspirerojn kaj bezonojn de kocjevianoj oni devas mult-

foje tien veni, vidi kaj viziti.

La gajan etoson perfekte utiligis japana biznesmeno-esperantisto kiu, kiel handikapito je piedoj, inventis kaj realigis sakojn kaj valizojn ekipitajn de kaŝeblaj stango-apogiloj permesantaj al handikapuloj sen helpo de veturilo aŭ iu ajn persono memstare moviĝi hejme, surstrate aŭ en diversaj neatingeblaj ĝis nun situacioj. La urbaj aŭtoritatoj estis interesitaj pri produktiva kunlaboro kun la Etsuo Mijoshi pere de Esperanto kion traduke garantiis Edward Kozyra el Malbork.

Samtempe Esperantaliteraturo, vendata kaj promociata de Halina Gorecka sur ĉemuraj tabloj, plenigis kaj kontentigis intelektajn bezonojn de interesitaj partoprenantoj.

Sed post la atrakciaĵoj venis fine la dimanĉa, labora kaj forvetura tago. Kunsido de la Ĉefa Estraro de PEA kiel kutime realigata estas en „invite elektita” urbo de Pollando pri kio interkonsente decidis invitantoj Filioj de PEA. Same okazis en Pelplin, kie tradicia Esperanto-Renkonto nur pliriĉigis laborkunsidon de la PEA-estraro. Partopreno de eksterlandaj amikoj (ruslandano, japano) kreis agrablecon gvidi la kunvenon Esperante kaj pole kion ĝis nun ne postulis polaj estraranoj.

Ne malpli agrabla okazis forvetura parto kiam oni informis, ke la urbestro private invitas hejmen la PEA-estraron por viziti lian rezidencon antaŭ forveturo. Post la tradiciaj dankoj, adiaŭoj kaj intencaj invitoj kun ĉiuj

partoprenantoj kaj organizantoj de la Printempo–aranĝo, venis tempo kiam triaŭtomobila karavano direktiĝis al lasta „adiaŭa rezidenco” de Pelplin. Unuhora amikeca konversacio pri lingvaj problemoj kaj pri neevitebla internacia kunlaboro konvinkis la urbestron pri bezono de konstanta Esperanto–kunlaboro rezultita de nova Eŭropunia kaj lingva situacio.

„Revenu al Pelplin, sankta ĉefurbo de Kocjevie–regiono”, per tiaj vortoj adiaŭis nin urbestro kaj familianoj. Ni ne povas ne reveni tien!

Antoni Walaszek



E-ekspozicio en Bytom

Ĉijare Bytom festas jubileon de 750–jariĝo de aljuĝo de la urbaj rajtoj. Tio havis lokon en 1254 jaro. Bytom apartenas al la plej grandaj urboj de la Suprasilezia Industria Distrikto. Ankaŭ Esperanto en ĉi tiu urbo havas sian ne mallongan historion.

Okaze de la 96–jariĝo de la agado de la esperantistoj en Bytom la 6an de julio oni malfermis solene Esperantan ekspozicion. Ĝi okazis en Rotondo de la Urba Publika Biblioteko. Aranĝis ĝin la loka Filio de Pola Esperanto–Asocio.

La jaron 1908 oni agnoskis kiel komenco de la regula agado de esperantistoj en Bytom. En tiu periodo al Supra Silezio venis por certa tempo konata tiam esperantista aktivulo Paul Tar-

now, kiu kolektis unuopajn esperantistojn kaj preparis grundon por starigo de la Suprasilezia Esperanto Ligo, al kiu apartenis grupoj de kelkaj urboj. En 1914 August Strauch estis delegito de UEA en Bytom. Laŭ la informo en „Esperantisto” nr 230 el 1919 en la urbo komencis agi loka grupo de Germana Esperanto–Asocio, kies prezidanto estis Walter Knopf. Tiam oni fondis ankaŭ Societon de Katolikaj Esperantistoj kaj Pacamikoj „Fraterco” kaj aranĝis kursojn de la lingvo internacia. Bedaŭrinde jam ekde 1935 jaro komenciĝis atakoj de la germanaj aŭtoritatoj kontraŭ Esperanto. Post la dua mondmilito vivis en Bytom kelkaj esperantistoj, sed mankas dokumentoj pri la agado dum la jaroj 1945–1956. Unu jaron pli poste oni fondis PEA — urban filion kaj sekvis vigla partopreno en la movado, oni akiris propran ĉambron en Urba Kulturdomo kaj enkondukis instruadon en lernejojn. En 1959 jaro oni ŝanĝis la nomon de la strato Kamienna al nomo de L. L. Zamenhof. La 4a Tutpollanda Kunveno de Esperantista Junularo organizita en Bytom en 1962 arigis 450 partoprenantojn el 8 landoj.

La Esperanto–klubo en Bytom estas specifa regiona fenomeno. Al ĝi apartenas ankaŭ samideanoj el Zabrze, Chorzów, Tarnowskie Góry, Ruda Śląska. La prezidantino de la klubo, Łucja Stroskosz, loĝas en Katowice. La renkontiĝoj okazas la unuan mardon de ĉiu monato je la 17a horo en Bytoma Kulturcentro ĉe la strato Żeromskiego 27. Do oni

povas diri, ke tiu ĉi klubo plenumas integracian rolon en la regiono.

Al la malfermo de la ekspozicio venis ĉirkaŭ tridek personoj. Imponis multnombra junularo.

Flanke de la urbaj aŭtoritatoj, en la nomo de la Buroo de Promocio de la Urbo Bytom, la ekspozicion malfermis Krzysztof Wieczorek, kiu tre favore parolis pri la agado de esperantistoj en Bytom kaj esprimis esperon, ke la agado kaj la kunlaboro daŭros ankaŭ en la estonteco.

— Esperanto estas, post la angla, la dua lingvo, kiu trovas la universalan aplikon en interreto — diris Aleksander Zdechlik, reprezentanto de PEA en Gliwice. Kun tiu urbo li havas ankaŭ personajn ligojn. Malgraŭ, ke loĝanta en Zabrze, dum kelkaj jaroj frekventis elektronikan teknikumon en Bytom.

Krom beletro, lernolibroj kaj fabejoj tradukitaj en Esperanton kaj originale verkitajn en tiu lingvo, en la ekspozicio oni povis rigardi bildkartojn kun salutoj, multajn fotojn kaj diversajn esperantaĵojn. Estis bonega ŝanco ankaŭ renkonti samideanojn el diversaj urboj de Silezio, precipe de la industria parto de la regiono.

S-ino Aŭrelia Sokół venis kun siaj kvar genepoj parolantaj Esperanton. En la jaroj 1988–2002 ŝi gvidis lernejan Esperantan Rondon. Ŝia nepino Alina Sokół dum la malfermo de la aranĝo tre bele deklamis la unuajn versojn de la poemo „Sinjoro Tadeo” de Adam Mickiewicz kaj ŝia nepo Łukasz gvidis la gastojn tra la ekspozicio. Ku-

ne kun Ludmiła Domżałska el Ruda Śląska li prilaboras ankaŭ polan-Esperantan interretan paĝon. Jen la adreso: www.esperantobytom.republika.pl.

En la vitrino kuŝis ankaŭ eldonita dum lastaj jaroj ampleksa vortaro Pola–Esperanta. — Sufiĉe multe da peno kaj klopodo kostis prilaboro de tiu verko — konfesis Maria Bonczol el Tarnowskie Góry, la kunaŭtorino de la vortaro. Tute komprenebla afero. La laboro en tiu ĉi sfero ne estas facila, des pli ke lastaj jaroj abundas en neologismoj kaj ĉiu lingvo dinamike disvolviĝas. Memkompreneble — ankaŭ Esperanto. El la sama urbo venis Barbara Kucharska, kiu siatempe gvidis Esperanto–kursojn ankaŭ en Bytom. La Esperantan medion en Katowice reprezentis Barbara Wzgarda kaj Jan Zych.

La ekspozicio tre placis ankaŭ al sinjoro Klaus Krieger, germana esperantisto de dudek jaroj, jam emerita lektoro de la germana lingvo en la Silezia Universitato, loĝanta en Bytom de naŭ jaroj kaj jam dekdu jarojn en Pollando. Li tre volonte renkontiĝas kun esperantistoj en Pollando kaj profitas ĉiun okazon por paroli kun alilandanoj en la internacia lingvo.

En la organizo de la ekspozicio multon helpis Antoni Jerzy Walaszek. La sekretario de PEA kaj samtempe prezidanto de la klubo en Sosnowiec servis ne nur pri la konsultoj kadre de la aranĝo, sed ankaŭ provizis iom da eksponaĵoj de sia klubo.

Li utiligis la spertojn, kiujn li atingis dum la organizado de la jubileo de

centjariĝo de la Esperanta movado en Sosnowiec antaŭ du jaroj. — Mi faris tion je la peto de Stanisław Mandrak, prezidanto de PEA — substrekas s-ano Walaszek.

Tamen motoro de preparo de la ekspozicio estis Władysław Burszta el Zabrze, konata ankaŭ el tio, ke apartenas al kunfondintoj de la Klubo de Ministroj Esperantistoj starigita en Bytom en 1982 jaro. Al tiu klubo aliĝis poste esperantistoj-ministoj el aliaj urboj. Tiam oni komencis krei la ministan vortaron en sep lingvoj. La agado sur tiu kampo estis tiom fruktodona, ke en 1987 jaro dum la 72a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio oni starigis Internacian Ministan Esperanto-Societon (IMES).

Ĉiu el la vizitantoj havis eblecon skribi siajn rimarkojn kaj bondezirojn en la memorlibron. La ekspozicio daŭris ĝis la fino de julio. Mallonga raporto pri la aranĝo aperis en la regiona programo de la Pola Televido.

La esperantistojn el Tychy repre-



Unua Kongreso de Internacia Esperanto-Turismo en Pollando (Malbork)

Okazis de la 17a ĝis 21a de julio 2004, la unua Kongreso de Esperanto-Turismo; estis sukcesplena aranĝo, dank' al la organizantoj de „RONDOKASTELO” S-ro Eduardo Kozyra, S-ino Jadwiga Wasiuk, S-ino Teresa

Mozołowska kaj S-ino Irena Ślusarczyk, kaj aliaj klubanoj.

Fondita en Göteborg, la Internacia Turisma Asocio havis sian Ĝeneralan Kunvenon kun diversaj estraranoj kaj ĉefa rezulto celis daŭrigi la agadon.

Dum la oficiala inaŭguro, alparolis reprezentantoj el tri kontinentoj: Ameriko (Kubo), Afriko (DR Kongo) kaj Eŭropo (Hispanio, Belgio, Finnlando, Rumanio, Germanio, Pollando), ĉeestis ankaŭ la Urbestro de Malbork.

Alloga kaj bunta programo kun prelegoj pri turismo (Andreo Grzybowski), pri Afriko (Molière Ngangu), pri rapidkursoj (Augusto Casquero), pri arkeologio (Marcel Delforge), pri E-movado en Pomerio (Jadwiga Wasiuk kaj Eduardo Kozyra), pri Movado en Rumanio kaj venonta IFEF Kongreso en Brasov en majo 2005 (Rodica Todor).

Inaŭguroj de „ZEO-j” okazis apud urbo Tczew (aldonotaj al 30aj „MONUMENTOJ” en Malbork!) en vilaĝo Rokitki, ĉeestis la lokaj aŭtoritatoj kun la Distriktestro kaj Komunumestro de Tczew; temis pri E-Domo kaj Esperanto-ŝtono ĉe apuda arbaro. Kompreneble, ankaŭ neevitebla vizito al la fama „PARKO de la MONDO” kun multnombraj memorŝtonoj kaj arboj dediĉitaj al „Esperanto” en diversaj landoj kun novplantita „Valencia Kverko” (Hispanio) donaco de Valencia E-Grupo kaj Hispana E-Federacio, la 30. ZEO en Malbork!, ĉeestis ankaŭ la Urbestro de Malbork kaj Estrino pri Promocio de la Urbo.

Se temis pri turismo, ne mankis multaj vizitoj, unue fame konata, la Teŭtona Kastelo de Malbork (UNESKO monda-heredaĵo) kun ĝia muzeo, spuroj de epopea historio, kiel ankaŭ en Gniew, restaĵo de mezopoka kastelo, kiu trapasis multege da teruraj periodoj.

Vizito al la Katedralo en Pelplin impresis la kongresanojn, ne nur pro ĝia unika en Eŭropo altaro kaj orgeno, sed ankaŭ ĉar speciale orgenludis kaj kantis diligente la artistoj.

Vizito al Gdansko memorigis pri preskaŭ freŝdataj eventoj; en Sopot, moleo eniras tre longe en la Balta Maro kaj multaj budoj vendadas allogajn memoraĵojn.

Ĉiam bone akceptitaj, kelkfoje de folklor-ensemblo, ekzemple „MODRAKI” („CEJANOJ”), ofte de privataj esperantistoj, ĉiuj kongresanoj reiris kontentaj.

Estas proponite ke la dua Internacia Esperanto-Turisma Kongreso okazu en Rumanio, laŭ akcepto kaj propono de la responsuloj.

Marcel DELFORGE (Belgio)
Sendis: Augusto Casquero



STUDIO „P” EN TULUZO

En la lastaj numeroj de *PE* ni povis legi pri prezentoj de la nova teatra spektaklo „Ĉiu havas sian monton”, preparita de la junulara teatro Studio „P” el Toruń. La informoj pri la teatro, pri ĝia nivelo kaj ankaŭ pri tio, ke ĝi prezentas siajn programojn en la internacia lingvo (krom en la pola) disvastiĝis en Esperantujo.

Ĉijare francaj esperantistoj el la tuluzaj Esperanto Kultur-Centro sukcesis venigi Studion „P” al Tuluzo, por ke ĝi prezentu sian spektaklon en Esperanto dum la 18a FITE — la Internacia Festivalo de Infanaj Teatroj.

La festivalo, okazinta jam 18an fojon, kunvenigis ĉijare 240 junajn geaktorojn el 8 landoj. Teatraj grupoj prezentis siajn programojn aŭ en la franca, aŭ en siaj naciaj lingvoj. Unuan fojon, eksperimente, estis invitita grupo, kiu prezentis sian teatraĵon en Esperanto. Kvankam dum la Festivalo ne estis eblecoj multe paroli pri la internacia lingvo, la eksperimento ŝajnas esti sukcesa. Kolektiĝintaj esperantistoj povis plenĝui la prezentitan spektaklon. Meritas mencii, ke krom esperantistoj el Tuluzo venis samideanoj el la ĉirkaŭaĵo kaj F. M., kiu aŭdis iam en Pollando pri la toruna teatro, venis eĉ el Parizo. Cetere publiko entuziasme aplaŭdis la spektaklon kaj poste aŭdeblis diskutoj pri la enhavo de la teatraĵo, kio ne okazis post aliaj, nefranclingvaj prezentadoj.

Tuluzaj esperantistoj helpis al la Festivalo gastigante nin en siaj hejmoj,

zorgante pri ĉiu paŝo, tradukante kaj prezentante vidindaĵojn de la interesa, antikva urbo.

Apatran feston ni travivis en Arrout — tre interesa, malnova vilaĝo, situata en la pireneja regiono 100 kilometrojn suden de Tuluzo. Tien invitis nin la lokaj esperantistoj, kiuj organizis kaj gvidas en Arrout „Sunkompanion”, kiu estas edukripozeto por infanoj. Studio „P” prezentis sian teatraĵon subĉiele, meze de la vilaĝo. Krom alvenintaj esperantistoj spektis ĝin ankaŭ la lokaj loĝantoj kune kun la vilaĝestro, kiu ne nur apogas Esperanton, sed mem parolas ĝin.

La etoso de tiu okazintaĵo, fervoraj aplaŭdoj de ĉ. 40 persona publiko, sentebla ĉiupaŝe amikemo kaj la belega ĉirkaŭaĵo kortuŝis nin ĉiujn... Resumante la okazintaĵon kun ĝojo mi povas konstati, ke dank’ al kunlaboro de esperantistoj estis farita sekvonta paŝo por popularigi utilecon de Esperanto en la internacia skalo, ĉifoje en la teatra medio. Grava estas ankaŭ tio, ke niaj junaj geaktoroj el Toruń, kiuj antaŭnelonge renkontiĝis kun Esperanto kaj ĝis nun uzis la internacian lingvon nur sur scenejo, dank’ al la invito povis konvinkiĝi, kiel ĝi funkcias praktike dum la ĉiutaga vivo. Loĝante ĉe esperantistoj ili vole-nevole devis mem interkompreniĝi en Esperanto.

Mi esperas, ke en la sekvonta rakonto pri Studio „P” mi povos informi, ke la geaktoroj parolas Esperanton ne nur sursceneje...

Teresa Nemere

PASPORTA SERVO — interesa afero ne nur por gastoj

Antaŭ kelkaj jaroj mi decidis esti gastiganto de Pasporta Servo. La adreslibro ne necesas por ricevi gastojn kaj mi ne postulas ĝin, do, la organizaĵo TEJO ŝparas ĉiujare 10 eŭrojn da preskostoj kaj afrankoj ĉar mi proponas eĉ 2 lokojn: mian loĝejon kaj la gasteĉambron en bjalistoka E-klubo. Homoj, kiuj ne ĝuas E-etoson ofte miras kaj ne komprenas nian pretecon por senpaga gastigado de esperantistoj. Por mi ĉiu vizito estas kiel renkonto kun malproksima lando. Mia komputilo mallongigas la distancon kaj faras, ke korespondado estas rapida kaj malmultekosta. Bonega helpilo por vojaĝantoj! Ĉi-jare junie skribis al mi iu Kaija el Finnlando. Ŝi ekplanis la vojaĝon al Pollando kun sia amiko Manuelo el Kubo kaj deziris post la Turisma Kongreso en Malbork „pilgrimi” i.a. Litovion kaj Bjalistokon.

Ni interkonsentis la verŝajnan daton de ilia alveno kaj komence de julio mi foriris kun la grupo al Birŝtonas partopreni BET-40. Surloke estis belege kaj mi tuj forgesis pri hejmaj aferoj.

La urbeto situata en la meandro de la rivero Nemunas okazis pitoreska, loĝ-, ripoz- kaj laborkondiĉoj bonaj, eĉ bonegaj, se mi komparus kun pasintaj BET-oj. Venis pli ol 250 esperantistoj el 17 landoj. Inter ili estis multaj jam konataj geamikoj. Okazis ĝojo senfina!

Eksciante, ke nia malgranda gru-

po dezirus viziti Vilnuson organiza-
tojn petis nin renkonti surloke kun iu
esperantisto kaj preni de li la ofiacia-
lan invitilon preparitan por Manu-
elo — esperantisto el Kubo, kiu vojaĝante
Litovion bezonas ĝin por aranĝi en
Pollando necesan vizon.

Kiam mi ekaŭdis, ke tiu kubano
atendas en Malbork — mi estis certa,
ke tio rilatas al mia venonta gasto. Kiel
malgranda okazis nia E-mondo! Post
2 semajnoj nia klubano Celinka staris
sur la kajo de la stacidomo en Bjali-
stoko kaj atendis gastojn.

„Atentu pacience ĉe la lokomoti-
vo — iu venos kaj akompanos vin ĝis
la klubo” — tiamaniere mi respon-
das al ĉiuj petantoj. Ni estas pretaj por
ĉiĉeroni tra la urbo, montri nian bele-
gan klubon, babili...

La unua vespero estis longa kaj gaja.
Ni komune admiris kolorajn fontanojn
en la parko kaj Bjalistokon nokte. Ma-
tene Jarek prenis gastojn por montri
la vilaĝon, faman pro multaj cikoniaj
nestoj kaj popolan kermeson en Kier-
musy. Posttagmeze ni komune aten-
dis ĉe la lokomotivo laŭvican japanan
gaston. Antaŭ 2 jaroj Yoichi lasis sian
malinteresan laboron en Tokio kaj de-
cidis vagabondadi tra Esperanta mon-
do uzante Pasportan Servon. Ĝis nun
li sukcesis atingi eĉ Bjalistokon. Kiam
lunde vespere nian klubon vizitis 40-
persona grupo da judoj mi diris angle:
„Pardonu, sed mi ne scipovas paro-
li angle. Nun vi havos la unuan lecio-
non de Esperanto laŭ la metodo Cseh”.
Poste mi prezentis ĉeestantojn: el Fin-

nlando, Kubo, Japanio, Pollando. Kutime
mi parolas malrapide kaj klare. Mi
estas certa, ke la partoprenantoj multe
ekkomprenis. Ili demandis pri la eble-
co de lernado, Esperanto-movado en
Izraelo, kvanto da esperantistoj en la
mondo, kaj vere miris kiam mi mon-
tris al ili Jarlibron kun E-adresoj en
ilia lando.

Kion mi ellernis dum kelkaj tagoj
dank’ de miaj gastoj?

- ke japanoj ne laŭdas familianojn.
Kiam venas gastoj mastro diras: par-
donu, ke mia domo estas tiel malriĉa
kaj mia edzino tiel stulta,

- ke kubanoj gajnas 8 dolarojn po
monato kaj intervjuo (eĉ negativa) en
usona ambasadejo por postuli vizon
kostas 65 dolarojn. En Pollando oni
jam forgesis pri manĝotalonoj, en Ku-
bo ili fartas bone,

- ke en Finnlando homoj vivas en
pli granda harmonio kun naturo ol en
Pollando,

- ke judoj estis same interese-
maj pri la mondo kiel veraj esperantistoj.
Ili promesis al mi lerni Esperanton kaj
veni denove Bjalistokon.

Dum la unua vespero niaj ga-
stoj deklaris en la klubo memorli-
bro, ke la restado en la bjalistoka klu-
bo similis al la restado en 7-stela
hotelo. Kadre de Pasporta Servo niaj
klubanoj planas viziti baldaŭ grupe
Germanion. Certe, ni sukcesos!
Iu venezuela esperantisto skribis al
polaj-esperantistoj@yahoo.com:

„Karaj Samideanoj el Pollando, mi
kore dankegas la atenton, kiun vi mon-

tris al mia helpopeto... En via respondo certe vidiĝas ke Esperanto ne estas nur unu movado por disvastigi lingvon sed ankaŭ pero por disvastigi mondan amikecon kaj homan interkomprenon". Li planis la vojaĝon al Bjelorusio kaj serĉis kontakton en Varsovio por aranĝi vizon. Ni proponis al li veni Bjalistokon kaj aranĝi la vizon en bjelorusa konsulejo.

Ideo de Pasporta Servo estas vere utila. Nun mi atendas gastojn el Siberio. Tie mi jam *propravole* estis kadre de Pasporta Servo kaj venas la tempo de reciproko.

Ela Karczewska



AMI signifas KOCHAĆ

Apenaŭ fininte siajn okupojn, ili jam kuras al la aldonaj. Kvankam neniu ekzamenas, neniuj pritaksas, ili partoprenas ilin volonte. Pro la nova lingvo kaj... sinjorino instruistino.

La vortaro:

ami — kochać, arto — sztuka, bona — dobry, certa — pewny, danki — dziękować, eraro — błąd, filo — syn, globo — kula, hela — jasny, infano — dziecko, kredi — wierzyć, legi — czytać, mano — ręka, noti — notować.

Esperanto ebligas ekkonon de grandiozaj homoj kaj lokoj en la tuta mondo — diras instruistino Bożena Pietrzyk.

Universitato de Zielona Góra. Ĵaŭda vespero. Bożena Pietrzyk sidas en la halo, apud salono, kie ŝi baldaŭ komencos lecionojn. Daŭre venas gestudentoj. Salutas. Demandas pri diversaj aferoj, ne nur tiuj, rilatantaj al la lingvo internacia. Post momento ili eniros la salonon, kie ili komune kantos. Esperante. Aldonaj, senpagaj okupoj en la Universitato estas la ideo de sinjorino Bożena. Ŝi dankas al prorektor, ke li permesis renkontadi kun junularo. Pli frue ŝi instruis la lingvon al junularo en la vilaĝo Borowiec kaj dum tri jaroj lernantojn de liceo en Nowa Sól, kie ŝi loĝas.

Artafiŝoj de Wojtek

La tutan sian vivon sinjorino Bożena instruis ion; kaj la polan lingvon, kaj aliajn lernobjektojn, laŭ aktualaj bezonoj. 10 jarojn ŝi estris la komunuman lernejon en Siedlisko. Hodiaŭ emeritino, 75-jara, daŭre estas aktiva. Ŝi volas transdoni siajn scion kaj spertojn.

— Estis por mi grave, ke venu estontaj instruistoj. Ili volos poste instrui aliajn la lingvon — substrekas Barbara Pietrzyk. — Wojtek Światała, kiun mi instruis en Nowa Sól, kaj nun studas en Artista fakultato, faris belegajn artafiŝojn. Studenta gazeto kelkfoje aperigis artikolojn pri la kunveno. Kaj venis 89 personoj.

Senpaga tranoktado

Kiamaniere komenciĝis aventuro de sinjorino Bożena kun Esperan-

to? Konatulino iam telefonis al mi kaj diris: — Aŭskultu, vi lernis la latinan, la francan, estos por vi facile. Mi invitas vin al esperantista renkontiĝo. Do, ŝi iris.

— Kiam mi aŭskultis ilin legantaj Invokacion el „Sinjoro Tadeo”, mi jam sciis, ke mi restos tie — diras Barbara Pietrzyk. — Bela lingvo, kiel muziko...

Nun ŝi havas multajn amikojn en la tuta mondo. Ŝi veturas al ili, senĉese invitata. Skribas sekvajn leterojn al: Japanio, Ruslando, Svedio, Francio, Danlando...

Andrzej Kizkiel el Lubsko ankaŭ havas pri kio renkonti. Li estas studento de Interlingvistikaj Studoj en Esperanto, kiu funkcias ĉe UAM en Poznań. Kaj ankaŭ la ano de la „Pasporta Servo”-klubo, dank’ al kiu li vizitas la mondon senpage.

— Ĉi tie estas la adreso, telefonoj de senpagaj tranoktejoj, mia hejma ankaŭ — li montras la libron al la gestudentoj. — Sufiĉas telefoni kaj esperantistoj tranoktigos, ofte proponante ankaŭ nutraĵon. Ili estas tre specifa homgrupo. Almenaŭ pro tio valoras eklerni la lingvon, por partopreni E-aranĝojn, vojaĝi tra la mondo havante konscion, ke en ĉiu loko estas iu, je kies helpo oni povas kalkuli.

Dum plej proksima semajnofino okazos la sekva esperantista renkontiĝo. Nun ĉe la lago en Sława. [red]

14 Internacia Esperanto-Kongreso en Ĉinio

Dum la 22a de julio ĝis la 20a de aŭgusto 2004 okazis en Ĉinio la 14 Internacia Esperanto-Kongreso (IEK) organizita de Internacia Klubo „Esperantotur” kaj vojaĝoficejo „Flugo” el Bydgoszcz (Pollando).

La celo de la Kongreso estis promocii Esperanto-turismon en Ĉinio kaj ebligi ankaŭ partoprenon en la 89a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino. La pli ol 30 kongresanoj el 8 landoj de Eŭropo kaj Azio vojaĝis laŭ ok diversaj vojaĝvariantoj, plenumantaj ĉies individuajn vojaĝdezirojn.

La Kongreson oni komencis per 9-taga restado en Pekino, dum kiu dezirantoj partoprenis la 89. UK, kaj krome oni realigis plurajn vizitojn, i.a. en Malpermesita Urbo, Ĉiela Altaro, Somera Palaco, Beihai Parko, Granda Muro kaj Tomboj de Ming Dinastio kun ekskurso al Tianjin kaj Flava Maro, kelkaj temploj, gustumadon de Pekina Anaso kaj akcepton en Universitato pri Administrado.

Sekve oni vojaĝis al historia urbo Xi’an por viziti Muzeon de Terakota Armeo, Tamburan Turon, Grandan Moskeon, Pagodon de Granda Ansero, defendomurojn kaj Muzeon de Steloj — la plej pezan ŝtonan bibliotekon de la mondo, taoisman templon.

Parto de la grupo flugis al Tibeto kaj konatiĝis kun Potala Palaco kaj kun aliaj temploj. En Chengdu oni vizitis Instituton de Granda Pando

kaj buddisman templon, gustumis la siĉuanan varmegan poton kaj daŭrigis buse al Chongqing — la 18-miliona aglomeracio, vizitis ĝin, ankaŭ sidejon de E-Asocio, denove gustumis la siĉuanan kuirarton kaj per ŝipo daŭrigis krozadon laŭ Jangcy-rivero spektinte vidindaĵojn de Tri Grandaj Gorĝoj, poste de Tri Malgrandaj Gorĝoj kaj fine gorĝojn de Midi-rivero.

La kvartagan krozadon oni finis en Yichang, trapasante kaj poste vizitante la plej grandan akvo-barilon en la mondo. Sekvis vizito en Jiling-urbo kun „Ĉu”-kulturo kaj grandega triurboparta Wuhan, kun vizito en Pagodo de Flava Gruo kaj buddisma templo. Per luita buso oni daŭrigis vojaĝon al urbo Hefei, kies reprezentanto S-ro Liu Jianguo — Vicprezidanto de Internacia Klubo „Esperantotur” estis ĉefa organizanto kaj E-gvidanto tra Ĉinio. En Hefei oni vizitis Bao Templon, la urbon mem kaj oni travivis emocian renkonton en fama Kungfu-lernejo en Hefei.

Sekvis busvojaĝo tra Nankin al Suzhou — la fama urbo de silko, ĝardenoj kaj Venecio de Oriento, kaj de tie oni daŭrigis al Hangzhou 7-miliona urbego de ĝardenoj kaj silka industrio, tie oni ĝuis boatekskurson tra la fama Okcidenta Lago. Sekvontage oni atingis la plej impresan centron de komerco — Shanghai, kie oni vizitis Urban Muzeon, faman Bund kaj kelkaj bazaroj. Tie la kongreso dividiĝis al ses grupetoj kaj oni daŭrigis aviadile aŭ trajne al

Kantono, kiu impresis per la plej nova moderna flughaveno kaj per vespera ŝipekskurso laŭ Perla Rivero.

Fine oni trajne vojaĝis al impresplena Hongkongo, de kie katamarane al Macau. La vizitoj en tiuj urboj finis la riĉegan turisman kaj kulturen programon de la 14 Internacia Esperanto-Kongreso, kiu sukcesis ankaŭ dank’ al helpo de pluraj esperantistoj en Pekino, Xi’an, Chengdu, Chongqing, Wuhan, Hefei, Suzhou kaj Kantono — Guangzhou. En Ĉinio dank’ al esperantistoj bone funkcias internacia Esperanto-turismo.

La vojaĝon gvidis nome de Internacia Klubo „Esperantotur” — ĝia prezidanto Andrzej Grzębowski, kaj nome de „FLUGO” — lia filo Andreo Grzębowski — ĉefo de la oficejo.

Post la monata Esperanto-vojaĝo tra tuta Ĉinio ĉiuj revenis kontentaj. Jam nun estis planita por majo 2005 jaro la nova E-vojaĝo tra Ĉinio, kiu promocios ankaŭ la sudajn partojn de Ĉinio, inkluzive insulon Hajnan kun ĝiaj belegaj plaĝoj en Sanya.

Pliajn informoj pri la vojaĝo — la 21a Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo en Ĉinio estas riceveblaj de Internacia Klubo „Esperantotur” en Bydgoszcz, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, Pollando, tel/fax: +48(52)3461151, Rete: info@esperanto-turismo.com.

La feria amo

*Knabinoj havis belajn piedojn,
knabaj okuloj sekvis ilin
kvankam jupetoj estis mallongaj,
kisojn facile ne donis knabinoj.*

*Zunjo, Zunjo, kial vi vizaĝon kaŝas,
Zunjo, Zunjo, permesu vin kisi,
Zunjo, Zunjo, neniuj nin vidas,
Ĉirkaŭe nur montoj kaj arbaro estas.*

Tiun ĉi kanzonon kantis la blonda junulo akompanante sin per gitaro kaj sendante signifajn, amindumajn rigardojn al la bela, juna knabino.

Ili ambaŭ venis hieraŭ al Mazurio — la pola nordorienta regiono, kie estas lagoj kaj arbaroj. Ĉi tie, ĉe la lago, en arbaro, proksime al la urbo Węgorzewo (Vengojevo) estis somerferiaj kolonioj. La somera suno lumigis la belan ĉirkaŭaĵon kaj la grupon, kiu konsistis el la juna paro kaj infanoj.

Ili ambaŭ estis gestudentoj kaj venis ĉi tien el Varsovio por ripari sian studentan buĝeton. Ŝi estis alta, svelta, kun nigraj okuloj kaj haroj. Li kontraŭe, estis malalta, blonda kun helaj, bluaj okuloj. Li kondukis senĝene kaj gaje, ludis gitaron kaj bele kantis. Ŝi kontraŭe, estis timema kaj kompleksita. Spertojn en viraj-virinaj aferoj ŝi ĝis nun ne havis. Kontraŭe al li, kiu jam ofte agis en tiaj situacioj. Nun li ankaŭ pensis pri agrabla flirto.

En la sepdekaj jaroj komenciĝis la modo por „libera sekso” inter studentaro. Eva originis el malgranda urbeto kaj ŝi havis rezistojn kontraŭ ĝi. Ŝi ankoraŭ ne precizigis siajn sentojn rilate al sekso. Oni diras, ke nematura sekse junulino ofte ne scias, kion ŝi mem volas. Certe ŝi revas pri iu agrabla junulo, kiu admiros ŝin. Andreo ŝatis pli altajn knabinojn ol li mem estis. Do li tuj komencis amindumadon:

— Vi estas ĉi tie la plej bela knabino. Pro kio vi estas timema — li komencis? Ŝi ruĝiĝis kaj ridetis. „Esti admirata, estas agrable” — ŝi pensis. Andreo logis ŝin per sia gajeco kaj senĝena konduto. Vespere li denove kantis siajn kanzonojn, sekvis Evon per siaj bluaj okuloj. Ĉi tiuj kanzonoj kortuŝe tuŝis Evon. Ŝi ŝatis ilin. Ne estante kapabla kantistino, ŝi volonte aŭskultis kiam aliuloj kantis. En sia ĉambro

ŝi trovis florojn sur la tablo kun la karteto: „Por la plej bela knabino”.

Andreo rapidiĝis sciante, ke la somerferioj, kolonioj kaj la somero daŭras mal-longe. Kiel delogisto li sentis, ke influas Evon. La saman vesperon li petis ŝin je rendevuo.

— Ni povas iri al kafejo, kiam la infanoj ekdormos, post la 22a. Mi petos la permeson de la estro. Ne timu!

Ŝi ekĝojis. Ĉe la kafeja tablo ili ekkonatiĝis pli proksime.

— Mi studas biologion — Andreo diris.

— Mi estas studentino pri historio.

— Ni studas en la sama lernejo kaj ni ĝuste ĉi tie renkontiĝis. Ĉi tio estas nia destino.

Andreo signifoplene tuŝis la manon de Eva. Ŝi ruĝiĝis kaj sentis iun mirindan, dolĉan tremon.

Poste ili malrapide revenis al sia kolonio. Estis malhele, varme, odore, do bonaj kondiĉoj por enamiĝantoj. Ili komencis karese alpremi sin reciproke, sekvis varmaj kisoj. Venonttage ili denove renkontiĝis tuj puŝt la dudekdua horo.

Tiam Andreo atakis Evon pli persiste, per kisoj kaj karesoj li provis akiri ĉion en ĉi tiu seksa domeno.

Ŝi komence akceptis tion kaj reciprokis. Ĝis nun ŝi jam spertis kisojn kaj karesojn kun junuloj, sed nenion pli.

— Mi plaĉas al vi, ĉu ne? — li flustris. Pro kio vi defendas vin?

— Mi ankoraŭ ne faris „tion” — ŝi konfesis. Mi ne scias, ĉu mi volas tion fari tuj kaj nun.

Andreo seniluziiĝis, tamen ĉesis. Li diris al ŝi: — Ĝis revido, ĝis morgaŭ!

Venis la tria tago de la restado. La kolonia personaro sidis ĉe matenmanĝa tablo; la estro, la kuracistino, la flegistino kun sia kvin jara filineto kaj gekuratori-stoj. La filineto de la flegistino subite diris:

— Onklo Andreo hodiaŭ nokte rompis la liton, sur kiu li kaj mia patrino dormis.

Ekestis silento. Neniu sciis kion diri. La infano vidante la surprizitajn vizaĝojn de plenkreskuloj daŭrigis:

— Poste li devis ripari la liton. Mi ekvekiĝis. Mi diros tion al mia patro.

Iu laŭte ekridis.

— Ili do tiom bone amuziĝis — diris la estro.

Eva lasis la matenmanĝon kaj eliris. Ŝi ne povis en ĉi tiu momento elteni tion. Ŝi estis ŝokita. Ĉiuj estis surprizitaj.

„Kiel li povis fari tion?” Nur tiu penso persiste ripetiĝadis en ŝia kapo. Ŝi ne povis tion kompreni. Aŭtomate ŝi kondukis, ne sciante kion fari. Malrapide ŝi kutimiĝis al la nova situacio.

Andreo kaj la flegistino amindumis libere. Ili ne havis bremsojn kaj ostentacie kondutis kiel amantoj. Ili kisis kaj karesis sin reciproke kaj ne estis por ili problemo, ke aliuloj vidas tion.

Eva suferis. Andreo jam ne estis por ŝi indiferenta. Ŝi enamiĝis iom — tiel ŝi provis klarigi la suferon. Li nun preskaŭ ne rimarkis ŝin.

„Bone, ke li ne konas miajn pensojn” — ŝi meditis.

Tiuj ĉi somerferioj estis por ŝi malfeliĉaj. Ŝi sciis, ke devas forĵeti el siaj pensoj ĉi tiun amsenton, hontosenton kaj konduti normale.

Kiam plenkreskuloj kune babilis, ŝi aŭskultis la kuracistinon, kiu diris:

— Oni devas ekkoni amrilaton longe antaŭ geedziĝo por adaptiĝi reciproke. Mi ne faris tion kaj nun mi suferas, ĉar mi kaj mia edzo ne adaptiĝis.

Andreo kaj la flegistino tuj montris sian adaptiĝon per demonstra kiso.

„Eble ŝi diras tion por mi — pensis Eva. — Mi dubas, ĉu la kuracisto pravas. Andreo certe estas malbona homo kaj li fie, egoisme kondutas. Oni devas esti prudenta rilate al viroj”.

Andreo kun la flegistino iĝis por ŝi preskaŭ persekutantoj. Ŝi ne povis rigardi ilin, sed devis kaŝi tion.

Foje la kolonia personaro organizis la amuzan renkontiĝon en restoracio. Eva sidis kontraŭ la paro kaj ne povis elteni vidante ilian amindumadon. Tial ŝi subite decidis pli drinki kaj iamaniere amuziĝi. Antaŭe ŝi neniam drinkis.

Iu viro invitis ŝin al danco. Ŝi rapide konsentis amuziĝi kun ĉi tiu hazarda viro. Kiam li petis ŝin eliri eksteren, ŝi ankaŭ konsentis.

Kiam ili forlasadis la lokalon Andreo kriis:

— Atentu! Ŝi estas la lasta virgulino!

„Andreo estas porko” — ŝi ekpensis kaj tuj malebriiĝis. „Amo estas bela en kantoj kaj poezio, sed ĝi certe ne veriĝas en ies vivo” — ŝi konstatis, kaj ne sciante kiel, ŝi troviĝis en sia kolonia ĉambro.

La kolonioj rapide pasis kaj Eva iel travivis ilin. Tamen ŝi memoris tiun tempon kaj tiun senton kiel ion malagrablan, sed instruan. Certe ili donis al ŝi iun vivan, sobran sperton, almenaŭ oni devas tiel pensi.

Eble ŝi estiĝis pli saĝa. Ĉu tamen ŝi scias kiel agi en dubaj situacioj kaj trovi sufiĉe da fortoj por ĝusta konduto? Probable ne, ĉar tio ne estas facila.

La homo estas nur malforta estaĵo kaj saĝe vivi povas nur provi.

Ĉi tiu rakonto certe naskiĝis danke al tiu evento.

Barbara (Nowy Sącz)

Forpasis

Monika Bilnik

La 15an de junio 2004, post serioza malsano, mortis en la urbo Elk konata esperantistino Monika BILNIK. Ŝi havis 71 jarojn.

En sia vivo ŝi havis du pasiojn — teatro kaj Esperanto. Spektakloj preparitaj de ŝi gajnis multe da premioj. Al Esperanto dediĉis siajn lastajn 30 jarojn. Ŝi instruis amatan lingvon al infanoj kaj plenkreskuloj ne nur en Elk sed ankaŭ en Bjalistoko.

Ŝi kontaktiĝis kun esperantistoj el la tuta mondo. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi fondis la E-grupon ĉe „Civitas Christiana” en Elk. Pro sia laboro ŝi ricevis multe da honoraj distingoj.

Kun bedaŭro —

esperantistoj el Elk



Pastro Jan Siemiński

La 7an de julio post longa malsano mortis en Gliwice pastro Jan SIEMIŃSKI. De multaj jaroj pastro Jan kunlaboris kun loka filio de PEA. Li estis animzorganto de esperantistoj ne nur en Gliwice sed en la tuta Supra Silezio.

En la jaro 1999 kunorganizis XIV Esperantistan Ekumenan Kongreson en Gliwice, kaj multfoje celebris aŭ kuncelebris sanktajn mesojn por esperantistoj. Estis organizanto de t.n. „novjaraj oblataj renkontiĝoj” de esperantistoj en Gliwice.

Pastro Siemiński estis konata an-

kaŭ en medioj de laboristoj al kiuj organizis ĉiujare „Tagojn de Kristana Kulturo”. Kun granda bedaŭro gliwiceaj esperantistoj adiaŭis Lin sabate la 10an de julio 2004.

**Pola Esperanto Asocio
Filio en Gliwice**



Ekde la 1a de marto 2004 retejo „Eŭroponto” troviĝas en la reto sub propra tutmonda adreso <http://europonto.org>. Tiu retejo estas dediĉita al Eŭropa problemaro. Siajn rimarkojn kaj proponojn bonvolu direkti al la adreso europonto@europonto.org

Esperantan version posedas ankaŭ du genealogiaj retejoj:

- a) Gento-retejo de la Silezia Genealogia Societo <http://free.ngo.pl/gento>
- b) Foraj Kuzoj el Europo — retejo de la Genealogia Societo „Worsten” <http://worsten.org>

• *La Sankta Blbio — nova eldono kun duakanonaj (katolikaj) libroj estas aĉetebla en Eldonejo HEJME. Prezo (egalvaloro de) 13,30 EUR + sendokostoj. Tiu ĉi prezo koncernas nur aĉetantojn de ekssocialismaj landoj.*

• *Maciej Zgondek, Iĝu esperantisto! Samouczek języka esperanto. Speciala oferto por junularo: dum septembro prezo 16,00 zł + sendokostoj. Por kursgvidantoj, kiuj mendas 10 aŭ pli ekz., prezo 14,00 zł.*

Czesław Miłosz

Meditado

Sinjoro, tute eblas, ke homoj glorante Vin eraris.
Vi ne estis reganto sur trono, al kiu de la teraj malaltaĵoj
Suprenflugadis preĝoj kaj fumo de incenso.
Trono, kiun ili imagis, estis malplena kaj Vi ridetis amare
Vidante, kiel ili turniĝas al Vi kun espero,
Ke Vi gardos ilian grenon kontraŭ hajlo kaj korpon kontraŭ malsano,
Ke Vi liberigos ilin de pesto, malsato fajro kaj milito,
Vi, migranto ripozanta ĉe nevideblaj akvoj, daŭrigis malgrandan fajreton
en tenebro,
Kaj ĉe ĝi, meditante, Vi skuadis la kapon.
Tiel forte Vi deziris helpi ilin, kontenta, kiam Vi sukcesis.
Kompatante al ili, pardonante ilian eraron,
Ilian hipokritecon, konscian, kvankam ili simulis, ke pri ĝi ne scias,
Kaj eĉ malbelon, kiam ili arigadis en siaj preĝejoj.
Sinjoro, mia koro estas plena de admiro kaj mi volas interparoli kun Vi,
Ĉar mi pensas, ke Vi komprenas, malgraŭ miaj nekonsekvencaĵoj.
Ŝajnas al mi, ke nun mi jam scias, kio signifas ami homojn
Kaj kial en tio al ni malhelpas soleco, kompato kaj kolero.
Sufiĉas forte kaj persiste primediti unu vivon,
De iu virino ekzemple, kion mi nune faras,
Kaj aperas grandeco de tiuj tiom malfortaj estaĵoj,
Kiuj scipovas esti honestaj kaj bravaj, paciencaj ĝis la fino.
Kion mi povas pli, Sinjoro, ol tiel kontempli
Kaj ekstari antaŭ Vi korpklinante kiel suplikanto,
Pro ilia heroeco petante: akceptu nin en Via gloro.

tradukis: Lidia Ligęza